

La Suda Kraco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 22. Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 Aprilo, 1922.

Teachers and Esperanto.

Victorian State School Teachers are having the claims of Esperanto to their attention kept prominently before them. An interesting series of addresses on the subject will be given at the Teachers' Training College on the 19th April. "The Program," (official organ of the Victorian State School Teachers' Union), in its April issue printed a two-column "open letter" to the members of the Teachers' Interstate Conference, Easter, 1922. This letter reviewed the advantages which would follow the universal adoption of Esperanto, its present progress, the results that have followed its instruction in certain schools, and the opinions of leading philologists. The last departmental "Education Gazette" published a letter from the modern languages master at the Teachers' College about Esperanto.

Examination.

An examination for the B.E.A. preliminary certificate will be held by the A.E.A. in Melbourne during the last week in May. Those intending to sit should notify the secretary before the 28th April.

Australian Natives' Association Recommends Members to Learn Esperanto.

This important association of native-born Australians has just concluded its annual conference. It considered a great many questions of national importance, and in view of the influence it has in moulding public opinion it is specially gratifying to Esperantists to note that one of the resolutions of the conference was a recommendation to all branches to establish Esperanto classes, and to the Board to assist in the furtherance of the study of the language.

The secretary of the Australian Esperanto Association has already communicated with the General Secretary of the A.N.A. with a view to putting this resolution into practical effect.

Nova U.E.A. Vic-Delegito en Melburno.

La Melburnaj membroj de la U.E.A. en sia lasta kunsido elektis sinjoron Roy R. Rawson kiel lokan vic-delegiton. Lia adreso estas 212 strato Swanston, Melburno.

Tagoj en Rabaul.

— Mastro! Mastro! — Urĝa duonvoĉo sonas ie proksime.

Malklare tra la duondormo kaj la dika moskiteltena reto, mi eksentas, ke la mateno venis. Ekstere, la suno forte kaj flave lumas sur la flave-verda herbo. Interne, la preskaŭnigra vizaĝo de mia juna domservisto aperas apud la lito, kaj tekolora mano prezentas tason da teo. Mi penseme trinkas la teon, kaj levigas por travivi alian tropikan tagon en Nov-Gineo.

Dum la duŝado mi de tempo al tempo ekvidas la "knabon," kiu diskrete sin banas malantaŭ la aparte staranta kuirejo, kaj tamen li ne ĉiam sentas la bezonon demeti la lumbotukon, sed kontente lasas ĝin sekigi sur la korpo. Kaj dum la ceteraj ceremonioj de mia tualetto li diligente okupas sin en la kuirejo. La manĝotablo por la simpla matenmanĝo estas jam primetita; la freŝaj vestoj por la tago jam kuŝas sur seĝo, la butonoj (kiujn mi neniam uzas) jam brilas en la jakso, la blankaj ŝuoj jam staras apude; ĉio estas preta.

Restas nur prepari la teon. Granda tasko, evidente. Du-trifojé aperas ĉe fenestro de la kuirejo nigra kapo kun krono el nigrega, krispa hararo kaj brakoj dismetitaj sur la sojlo, kun demando, ĉu mi eble vestos hodiaŭ la nigrajn ŝuojn pro minacanta pluvo, aŭ ĉu li donu al la venanta Ĉina lavisto la uzitajn vestojn... kaj la demandoj estas farataj kun serioza, distrita mieno de dommastrino, kiu preparas dimanĉan tagmanĝon por granda familio. La kuirejo mem helpas al la iluzio de granda laboro: el la fenestroj, pordo kaj tegmentorando fluas senfine kvanto da fumo, kiu memorigas pri la apokrifa legendo de Karlo Lamb pri la Rimarkinda Eltrovo de la Rostita Porkaĵo, laŭ kiu la Ĉinoj kredis, ke estas bezone forbruligi tutan domon por rosti unu porkon. Kaj ĉio ĉi por prepari du tasojn da teo.

Mangante en plena aero sur la verando—en Nov-Gineo oni kiom eble vivas sur la vastaj verandoj de la "bangaloj"—mi foje levas la okulojn for de la libro kaj rigardas la senfinan movon ĉirkaŭ mi. Flave-

grizaj lacertoj, longaj nur du-tri colojn, kuras sur la planko, muroj kaj plafono, kaj ekhaltas por min rigardi per la komikaj, amikaj okuloj en la granda plata kapo. Pli grandaj lacertoj, duone verdaj, duone flavaj, kuras sur la trunkoj de la larĝaj arboj ombrantaj la domon. Unu-du moskitoj zumas ĉirkaŭ la tablo, aŭ tute sen zumo aŭ parolo aŭ alia averto ekpikas min. La ombroj de la altaj, delikataj, pinsimilaj casuarinarboj dancetas sur la herbo. Brunuloj iras tien kaj reen konstante: portante matenmanĝon en emajlita, multetaĝa pladaro aŭ proprajn trezorojn en simpla, malvasta korbo ligita al la ŝultro; ili estas vestitaj per lumbotukoj de diversa koloro kaj diversa pureco. Hele blanka, radianta brilo montras pason de Eŭropano.

Mi jam parolis pri mia "knabo," la preskaŭnigra junulo el Buka (Bougainville), kiu faras miajn bezonojn. Fidela, laborema, ŝeptika, ŝercamanta, diligenta, kritikema, zorgema, gaja, pripensema, ironia Kina, kiel priskribi vin? Kina ne nur servas, li ankaŭ toleras min; la multaj nekompreneblaj kapricoj kaj kutimoj de la mastro pri vesto kaj manĝo estas por li senduba signo de frenezo; sed neniam eĉ unu konscia okulmovo tion perfidas. Lia maniero estas tiu de pacienca patrino, kies filo havas multajn junulajn fantaziojn, je kiuj li nepre resaniĝos poste kaj fariĝos saĝa kaj mensosana viro; sed dume oni devas ilin toleri kaj ne peni korekti. Tiu ĉi Buka filo faras ĉion, kion mi diras, kaj laŭ propra iniciato eĉ pli.

Dek-sesjara, maldika, apenaŭ ne nigra, kun ruĝa brakringo sur la maldestra brako laŭ kutimo de lia hejnvilaĝo, akra, ridetema, mokema vizaĝo ofte ekŝmirita per ornamo per ruĝa aŭ blua aŭ blanka strio, kun ruĝa aŭ flava lumbotuko kaj samkolora hibisko-petalo super la orelo en la densa nigra hararo—jen la ekstera aspekto de Kina. Priskribi unu indiĝenon estas priskribi ĉiujn; sed egale, priskribi unu estas montri, ke ĉiuj estas diversaj; kaj inter la brunaj Sudmaranoj ekzistas la sama senlima diverseco laŭ aspekto, menso, spirito, karaktero, kiom inter la blankaj loĝantoj de pli malvarmaj terzonoj.

Kaj Kina, same kiel ĉiu alia homo, montras la tutan gamon de sentoj, pasioj, emocioj, de la mateno, kiam li vekas min per tintanta taso da teo, ĝis la vespero, kiam li venas kun plaĉopena, iom timema rideto, dirante. — Mastro, mi volus promeni nun.

“Mi volus promeni nun”; li efektive diras nek tion, nek: “I should like to go out now.” Li parolas nek la lingvon de Zamenhof nek la lingvon de Shakespeare. Li diras, en la klasika internacia lingvo de la regiono: “Me like go limlibur now,” kio estas proksimume: “Min am’ ir’ promen’ nun.” “Limlibur” estas indiĝena vorto kun signifo “promeni.” Jen, sinjoroj filologoj, specimeno de la fama “piĝin”-Angla, kiel ni parolas ĝin en Nov-Gineo, tiu kvazaŭ forgesinda filo de la Angla lingvo, tre memorinda tamen en la rilatoj kun la indiĝenoj. Krom la misiistoj, malmultaj homoj scias la indiĝenajn lingvojn, kiuj estas tre multaj kaj diversaj.

En Rabaul sin trovas indiĝenoj el ĉiuj partoj de la Teritorio, kiel ankaŭ Ĉinoj, Japanoj kaj Malajoj, kaj regus haoso sen ia komuna lingvo, eĉ sen la kruda, malgracia, tamen logika piĝino. Ne nur kun la indiĝenoj kaj Azianoj, sed inter Angloj kaj Germanoj ne sciantaj la lingvon unu de la alia oni uzas ĝin, kaj eĉ inter Germanoj el malsamaj regionoj en Germanujo, kies prononcoj de la patrolingvo forte diferencas. Simpla, fleksebla, belsona, piĝino ne estas, ĝia prononco varias senfine, ĝi ankaŭ ne havas literaturon, sed ĝi estas rimedo, per kiu oni iel atingas la celon.

El la malgranda piĝinvortaro el du-tricent vortoj el la Angla, indiĝenaj, Ĉina kaj Malaja lingvoj, mi kuraĝas citi kelkajn. “Belong,” krom sia ordinara Angla senco “aparteni,” estas speco de piĝina “je” (“prepozicio, kiu difinitan senco tute ne havas”)—sed dekoble pli maldifinita. “Fellow” estas plej precize tradukata per “umo” aŭ “uma”; oni uzas ĝin ĉiam kaj ĉie, plej ofte sen ia videbla bezono. “Two fellow cup” (du umo taso) signifas “du tasoj”; “white fellow shoe” (blanka uma ŝuo) signifas “blanka ŝuo” aŭ “blankaj ŝuoj.” Pluralojn oni esprimas ĉefe per aldono de “al-together” (entute, ĉiuj kune). La

Rabaŭlaj lernantoj de Esperanto havas memorigilon pri la pasinta tempo de la verboj en la literoj “is” de la vorto. “finish” (fini): “E sing”; li, ŝi, ĝi aŭ ili kantas; “E sing finish”; li, ŝi, ĝi aŭ ili kantis. Utila kaj esprimplena vorto estas “maski”: ne grave! nenio grava! kiu solvas multajn problemojn en tropiklando “House money true” (domo mono verā) signifas “banko”; sed “house money gammon”. (domo mono trompa) estas la nomo de la Regna Trezorejo. La kolektadon de pluaj ekzemploj mi lasas al pli entuziasmaj studentoj de ĉi tiu “Anglido,” kies konkuradon kun la Angla mi tute ne timas.

Kelkdekoj da grandverandaj “bangaloj” (tropikaj domoj) kaŝataj inter altaj aleoj de la diritaj casuarinarboj, kun izolita Ĉina kvartalo el amasigitaj domoj kaj butikoj: jen Rabaul. La stratoj estas rektangulaj, kaj ombrataj de la superpendantaj arboj, tra kiuj oni iras kvazaŭ tra tunelo, kaj ĉe la fino de unu aŭ alia iom neregula aleo oni ekvidas la havenon. Se la tago estas hela—ĉiu tago ja ne estas hela tago en Rabaul—blue brilas la akvo kaj nete kontrastas la blankajn velojn de la skunoj starantaj sur la golfo; transe de la haveno, je du kilometroj proksimume, longa linio de nealtaj, iom senesprimaj montetoj montras la malhelan verdon de sia densa arbokovro. Hela verdo en la proksimo, bluo, blanko kaj malhela verdo—jen la konsisto de la bildo.

Sed se la nuboj kronas la montojn niaflanke de la haveno, tiam la akvo estas griza. Aŭ tute glate, vitre griza, kaj la skunoj kaj la krudaj tenejoj el blankigita fero inter la palmoj ĉe la akvorando rebrilas sen perdo eĉ de detaletoj en la akvo. Aŭ la vento ekpalpas ĝin dum sia paso, kaj lasas strion de senbrila akvo, kaj en la reflektado detranĉas velon al skuno aŭ tegmenton al domo.

Aŭ suno kaj vento konspiras, kun brilo kaj eksalto, kaj la akvo ridas, kvazaŭ dancetante de ĝojo.

Aŭ nigre blua nubo peze premas la montojn. Muĝas la alrapidanta pluvo, kaj la transa bordo malaperas post la ĉiam pli densiĝanta griza kurteno, la skunoj solviĝas en neniecon, kaj la akvo saltas kaj resaltas sub la skurĝo de la batanta pluvego.

Sed en pluvo aŭ brilo, sub nuboj aŭ bluo, la mil kaj mil aferoj de Rabaul devas esti farataj. La graciaj skunoj iradas al kaj de la sennombraj insuloj kaj insuletoj fore sur la Pacifiko, la "grandaj" ŝipoj el la sudo alportas pli-malpli akurate kurierojn kaj komercaĵojn, kaj oni laboras en kontoro, magazeno, oficejo. La brunuloj iras tien kaj reen sur la stratoj pro propra okupo aŭ pro komisiono, kun malrapida, celkonscia paŝado de pilgrimantoj, aŭ ludas futbalon sur ĉiu malplena spaco, eĉ antaŭ la fenestroj de la granda ĉaro mem de la Teritorio Nov-Gineo, la gubernatoro, aŭ sidas sur ŝtupo aŭ vojrandoj babilante kaj fumante, aŭ kuŝas en senzorga dormo sur verando aŭ apud trotuaro. Policoknaboj, kies kostumo konsistas ĉefe el blanka marista ĉapo, paŝas kun la tuta digno kaj memgraveco, kiu konvenas al gardantoj de la regna sekureco. Ĉinoj, viglaj, okupoplenaj, iras de loko al loko piede aŭ biciklete aŭ aŭtomobile. Bruneta, milda, servema, eĉ timema Malajo en zorge amelitaj vestoj—kiom li diferencas de la infana imagado de sangavida, ponardema mortigisto!—eble vendisto en magazeno aŭ skribisto en kontoro, pace iras sur la strato, laŭ kutimo salutante ĉiun renkontitan Eŭropanon.

Eksonas fajfo ĉe la glacifarejo. Dek-dua horo: Fermiĝas magazenoj kaj oficejoj, kaj ĉiuj iras por manĝo kaj siesto dum du horoj. Ĉiuj. . . nur ne la Ĉinoj. La grandioza, rekta aleo kondukanta al Ĉinurbo estas semita per homoj: Ĉinoj en blankaj aŭ flavaj vestoj, indiĝenoj en lumbotukoj de blanka, verda, nigra, blua aŭ ruĝa koloroj, sed plej ofte el ruĝa, indiĝeninoj en lumbotuko kaj tro mallonga bluzo el plej helaj, krudaj, akre dissonantaj koloroj, Eŭropanoj en la universala, demokrata, blanka vestaro, kiu ne lasas distingi rangon aŭ riĉon, foje nete vestita Japanino vivece trotanta, en la nacia kostumo, tien kaj reen iras, sed ĉiam la plej laboremaj kaj laborplenaĵoj estas la Ĉinoj. En Ĉinurbo ili faras dekon da metioj, sen kiuj Rabaul estus por ni Eŭropanoj senkomforta sovaĝejo. Tago kaj nokte ne haltas la laboro; kaj eĉ post la eldiro de la ukazo deviganta fermi la butikojn je la sesa horo ĝi daŭras kunsensaĝa diligento post fermaĵoj pordoj kaj malfermaĵoj fenestroj.

La plej forta varmo de la tago—tamen, neniam tiel forta, kiel la kruda varmejo de la somero en kelkaj netropikaj landoj—pasas for, la suno proksimiĝas al la montetoj trans la haveno, kaj la tago rapidas al sia fino. Nubaj kasteloj kaj piramidoj, gigantaj buloj de vaporo lumas ruĝete kaj salme-ruĝe en la okcidento, la akvo de la haveno montras ruĝon inter la bluo kaj verdo, kaj la orienta ĉielo super la montetrando Namanula, kie staras la loĝejo de la gubernatoro kaj la plej bona kvartalo de Rabaul, kaj de kie oni povas ankaŭ vidi la sunleviĝon super Nov-Irlando, montras palan reflekton de la okcidenta gloro. La suna disko ektuŝas la montetojn, malaperas, kaj. . . nokto.

Rabaul en la nokto, se la luno ne brilas, estas dezerto de mallumo kaj konfuzaj vojoj. La stellumon kaŝas la densaj arboj, kaj oni devas trapalpi al si la vojon kiel blindulo. Sed Ĉinurbo brilas de hoteloj, restoracioj por Ĉinoj kaj por Eŭropanoj, bilardejoj, kie la Malajoj amas restadi, kluboj politikaj kaj sociaj, kaj la butikoj kie la laboro ne ĉesas. Zumo de babilado venas de la kluboj kaj restoracioj; de la hoteloj venas gaja vodevila kanto, sonoj de disputado, aŭ melodia Germana horo. De la kinema eksonas rido aŭ aplaŭdo. Brunaj, malklare videblaj figuroj pasas kaj repasas en la ombro.

Mi iras hejmen por ripozi sur la verando, legi, skribi leterojn aŭ revii. Ĉirkaŭ la lampo flugas papilioj, marŝas sur la tablo aŭ eĉ sur mia libro aŭ papero. Konstante distras min iu nova speco, kiun mi ankoraŭ ne vidis: ŝajne oni neniam vidas dufoje la saman specon. La koloroj varias de densa velura nigra ĝis pala brila alumina. Verda, ruĝa, purpura, flava, viola, perla, bruna, kaŝtana: ĉiuj eblaj koloroj estas tie, kaj ofte du-tri koloroj sur la sama insekto. Kelkaj havas sur pala fono nigran rektlinian desegnon kvazaŭ faritan de desegnisto. Jen unu iras mediteme tro proksimen al la lampo kaj falas brulvundita sur la tablon. Tuj alkuras formiketoj el nenie, kaj formiĝas la internon de la korpo, lasante nur malplenan ŝelon. Mi malfermas keston, kaj blato rampas tien kaj tien interne kaj subite forflugas. Ŝajne ĉiu insekto povas flugi, kaj kutime kaŝas tiun faktoron, ĝis oni

ĝin preskaŭ kaptis kun mortiga celo. Araneoj spinas malvastan reton en kelke da minutoj; eble en la banĉambro oni ekvidas tarantulon je kvin aŭ ses coloj larĝa. La flavaj lacertoj rampas sur muroj kaj plafono, eĉ sur la tablo. Mi sentas ekpikon, kaj per malpacienca mano maltrafas ĉiam tro rapidan moskiton. La skribado kaj legado ne progresas.

Mi vokas mian knabon. Nenia respondo. Mi revokas lin. 'Malsankta silento. Maski! La afero povas atendi ĝis morgaŭ. Tiam mi rememoras, ke pli frue en la vespero li venis al mi: — Mastro! Mi volus iri al kinema.— Estas jaŭdo, la sola vespero, kiam oni enlasas indigenojn. Do mi donis al li ŝilingon kaj "pasporton" kun lia nomo en grandaj Romaj literoj, kiu permesas lin resti ekstere post la naŭa horo, kaj li foriris kontenta.... Ie sonas indigena "ĉanto": monotona, sufiĉe harmonia kantado, kun abruptaj ĉesoj kaj rekomencoj; kelkaj ĉantas en unu loko, kaj aliaj responde ĉantas en alia. Sed baldaŭ ĝin dronigas grinco de fonografo sur apuda verando: iu ludas la plej ŝirsonantan diskon de la plej ŝirkan-tanta komika kantisto. Aliaj fonografoj komencas. Baldaŭ mi povas distingi arion el "Il Trovatore," marŝon de Prusa milita orkestro, fajfan solon, sentimentalajn kanton, "Kiam vi Venas al Fino de Perfekta Tago," kaj aliajn trezorojn de la popola gusto. La skribado kaj legado ne progresas.

Mi iras "limliburi" sur la ŝipstacio, kie la fonografoj ne estas aŭdeblaj, kaj nur mallaŭte flosiras trans la akvo la indigena ĉantado. Sur la ŝipoj la indigenaj laboristoj kuŝas ĉirkaŭ olea lampo kaj babilas dormeme. Ie sonas la iom muzika zumo de... indigena muzikilo? Ne; de la bone konata "Juda harpo," fabrikita en Birmingham aŭ Belgujo, kaj aĉetita en Ĉinurbo.

En la nigro de la haveno rebrilas ĉiuj miriadaj lumoj de la ĉielo. Ĉiu pli granda stelo ree lumas tie sube per longa lumstrio, kvazaŭ eta cilindro lanterno pendanta je duonmetro sub la surfaco. La suda kruĉo mem, malalta sur la horizonto, estas fidele reproduktata. Lumoj sur la bordo, domlampo en Rabaul, fajroj en la indigenaj vilaĝoj trans la haveno, jetas longajn tremantajn striojn en la

oleeca akvo. Eĉ la palaj lumoj de neproksima Namanula reaperas en la marfundo. La du grandaj montoj staras duoblaj, monto kaj ombro. La duobla formo de la Patrino-Monto havas ardantan koron; hela fajro tie brilas... la forno de la glacifarejo! La luno leviĝas malantaŭ la granda monto, kaj la nigra haveno fariĝas argente perla. Venteto ektuas la akvon, kiu tuj ekbrilas per senfina serio de blankaj, helaj juveloj....

Oni revas pri la sudo—oni tiel ĉiam nomas Aŭstralion; sed la sudo estas malproksima, kaj pli facile oni memoras diversajn insuletojn en ĉi tiu regiono, kun blua maro, tondranta rifo, trankvila laguno, klara, apenaŭ videbla akvo, kaj pura sablo, ne makulita kaj malpura per la naturo, kiel Rabaul per sia apuda sulfurvulkano, kiu nigrigas la sablon kaj malklarigas la akvon, nek per la komercismo, kiel Rabaul ankaŭ per siaj Eŭropanoj kaj Azianoj. Jen granda ĝuo, marŝi sur tia bordo en la vespero, kun la murmuro de la malproksima rifo en la oreloj, la lumoj de la ĉielo en la okuloj, karesa zefiro sur la vangoj, kaj ho, kiaj pensoj en la animo! ĝis oni ekvidas fosforan ekbrilon sub la piedoj, kaj rimarkas, ke li subite enpaŝis en la akvon, kaj vekis ĝian latentan lumon.

"And when thyself with shining
foot shalt pass"

(Kaj kiam vi en brilpieda paso), mi citas al mi Persan poeton, kiu certe ne pensis pri la Mandata Teritorio Nov-Gineo.

Dormemo fine venkas la revadon, kaj mi iras hejmen kaj grimpas en mian liton kun la granda, kvadrata moskitreto, pro kiu mi sentas humiligan similecon al peco de viando en muŝeltena ŝranko. Ekstere la luno lumas trankvile sur la herbo sub la arboj. Granda kvieto. Kiel komforta estas la lito! Kiel mola! Kiel mola kaj lula estas la mondo. Kvazaŭ vasta kusenaro.... Mola.... Lula.... Tre lula....

— Mastro! Mastro!

A. Delsudo.

Filatelistoj! S-ro Josef Pumar, instruisto, Hradec Kralove II, Ĉeĥoslovakio, (ano de U.E.A. 14451), intersangas poŝtmarkojn de Ĉeĥoslovakio kaj de Centra Eŭropo. Ankaŭ pogrande. Respondos ĉiam. Faru la unuan sendaĵon.

Here and There.

The recently founded Women's International Federation, San Paulo, Brazil, has decided to use Esperanto in its foreign correspondence.

The Rev. Manoel Feitosa, Crato, Brazil, has learned Esperanto, and has promised to teach it in the local seminary.

Esperanto is permitted to be taught in the schools of Czecho-Slovakia, where the local authorities become responsible for the necessary expenditure, and where a capable teacher is available.

At Kiel there are two evening Esperanto classes conducted by the local school authorities.

The Czecho-Slovakia Touring Clubs, aggregating 21,000 members, have established an Esperanto section with the object of drawing international attention to the natural beauties of the republic.

The following Fairs, all of which seek to stimulate foreign trade, make use of Esperanto in their literature and use it in their correspondence:

Bordeaux, Paris, Lyons, in France; Breslau, Frankfort, Leipzig, in Germany; Vienna, Austria; Barcelona, Spain; Helsingfors, Finland; Padua, Italy; Malmö, Sweden; Bratislavia, Praha, in Czecho-Slovakia.

As a result of the international inquiry regarding the question of compulsory education, the Committee of Public Instruction, in Antwerp, has decided to introduce the teaching of Esperanto in certain schools. The inquiry referred to was made in Esperanto, and elicited 66 replies from 43 countries.

The international Labor Conference, at the instance of M. Justin Godart, chief of the French delegation, adopted a resolution in favor of using Esperanto in its correspondence.

Kroniko.

Whangarei, N.Z.—Jen tre agema grupo. Ĝi fondiĝis nur antaŭ unu jaro, sed en tiu tempo s-ro King instruis dek personojn, el kiuj unu gajnis unuan gradan diplomon. La sekretario nun instruas novan aron de komencantoj. Oficistoj por la venonta jaro estas:—Prezidanto, s-ro D. Tilly, del. U.E.A.; Grupa sekretario kaj kasisto, s-ro W. H. King; Negoca sekretario, s-ro P. Whittle; Komitato, f-ino Doris Tilly kaj s-ro J. Orme.

Melburno, V.—S-ro G. Redfern parolis pri Esperanto antaŭ la Australian Natives' Association, (Asocio de Aŭstralianoj), ĉe Brunswick, la 24an de marto. La ĉeestantoj montris grandan intereson.

Zamenhofaj Vortoj Pri Unueco.

Per unueco ni pli malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

Ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj aŭ gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa unueco, por ke ni akiru por nia afero la konfidon de la mondo.

Gvidfolio de Wiesbaden, Internacia Banurbo, havebla senpage de la tiea Urba Oficejo por Trafiko laŭ simpla mendo poŝtkarte. Tiu ĉi gvidfolio havas ses paĝojn en kiuj troviĝas ses fotografajoj kaj informo pri Wiesbaden, precipe pri ĝiaj kuracaj akvoj. Oni esperas, ke multaj samideanoj mendas ekzemplerojn, ĉar la broŝureto estas eldonita sekve de esperanta instigo.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monĵo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

Ho! Karulinet'!

Ĉe la monto
 Sur la ponto,
 Trans la riveret',
 Tage suno,
 Nokte luno,
 Ho, karulinet'!
 Birdoj, floroj,
 Niaj koroj,
 Kaj la flubruet',
 Oro suna,
 Perlo luna,
 Ho, karulinet'!
 Dolĉo via,
 Amo nia,
 Laŭdo le l' ondet',
 Scia fonto
 Sub la ponto,
 Ho, karulinet'!
 Ama tago,
 Nokta pago
 De la promeset',
 Ha, plenumo,
 Incensfumo,
 Ho, karulinet'!
 Kiso- via,
 Ravo mia,
 Goja la plaŭdet',
 Sciis ponto,
 Benis monto,
 Ho, karulinet'!
 Trans la ponto,
 Al la monto,
 Nia promenet',
 Preĝo nia,
 Fido dia,
 Ho, karulinet'!
 Ho, memoro
 Pri la horo,
 Pri la amridet',
 Pri la ponto,
 Pri la monto,
 Ho, karulinet'!
 Multaj jaroj
 De l' amfaroj,
 Vivo nur vivet',
 Dolĉa sorto,
 Sed la morto—
 Ho, karulinet'!
 Ho, espero,
 Ke la tero
 Eĉ per harĉenet'
 Min ne tiros,
 Se vi iros,
 Ho, karulinet'!

Matildo Direktilo.

Subteno Por La U.E.A.

Por konsideri kiamaniere ili povas doni monhelpon al la U.E.A. la melburnaj membroj kunvenis la 29an de marto. Proksimume tridek bonvolemujoj ĉeestis.

S-ro Ballard, la ĉef-delegito, klarigis, ke la U.E.A. suferas gravan perdon pro la rezultato de la malalti valoro de la mono de multaj Eŭropaj landoj. Li alvokis al la membroj por helpo, laŭ la letero el la Asocio.

S-ro R. Rawson parolis tre laŭde pri la helpo, kiun la U.E.A. delegitoj donis al li kaj al s-ro Pyke dum ilia ĵusa vizito al Eŭropo. Li proponis, ke oni faru monkolekton kun la helpo de la delegitoj en tuta Aŭstralazio.

Laŭ propono de s-ro Drummond la kunveno elektis s-rojn Ballard, Rawson kaj Drummond, kiel komitaton por aranĝi koncerton kaj festenon kaj por ricevi donacojn.

Oni decidis starigi monkolekton en ĉiu parto de Aŭstralazio kaj petas, ke la membroj persone postulu la helpon de ĉiu el siaj konatuloj. S-ro Ballard estas nomita kasisto. Por iniciati la kolekton la ĉeestantoj donacis dudek unu ŝilingojn.

Post la kunveno la ĉef-delegito skribis al ĉiu Aŭstralazia delegito kaj, espereble, antaŭ nun la afero jam ricevis tiel simpatian antaŭenpuŝon en aliaj lokoj, kiel ĝi ricevis en Melburno.

La Plena Aero, Libera Menso kaj Esperanto.

Lastatempe interesa ŝanĝo okazis en la oficistaro de la SKOLTA ESPERANTISTA LIGO. La eks-propaganda Fakestro, Subtrupestro K. Graham Thomson, fariĝis Eksterlanda Redaktoro de la angla monata ĵurnalò, THE TRAIL (La Vojo) kaj lin sekvis kiel Propaganda Fakestro, Subtrupestro J. W. Leslie, 527. Lea Bridge Road, Leyton, London. E. 10, Anglujo.

En la pasinteco THE TRAIL enpresigis artkolojn pri Esperanto kaj ĝia Redaktoro multe interesigas pri Esperanto kaj volas laŭeble ĝin subteni.

La nova Eksterlanda Redaktoro elektas en multaj landoj ekster Anglujo korespondantojn, kaj tiuj raportos al li EN ESPERANTO pri aktivecoj en siaj koncernaj landoj je geskoltado, atletiko, plenaero vivo kaj naturo-studo.

Deziras korespondi nur kun Aŭstralazianoj 24 ĝis 84 jaraj, Angle aŭ Esperante. F-ino Mary Fowler, Glen Mervyn, Mumballup P.O., Western Australia.

Ĉiunonate aperas en Esperanto oficialaj novaĵoj pri Esperanto. Movado kaj kvankam la plejmulto el la ĵurnalo estas presita en angla lingvo ĝi estas trege interesa al tiuj kiujn allogas la temoj suprenomitaĵ.

Pro tio ke la Estroj de THE TRAIL decidis subteni Esperanton oni multe esperas ke samideanoj reciproke subtenos tiun ĵurnalon. La ĵurnalo estas nur kvar anglaj silingoj pagebla al la Eksterlanda Redaktoro, THE TRAIL, Denison House, Vauxhall Bridge Road, London, S.W. 1.

Komercaj Ĉambroj.

La konferenco de Aŭstraliaj Komercaj Ĉambroj, de Hobarto, aprobis la ideon de Internacia Komerca Ĉambro. La utileco de tia Ĉambro dependos sur la facila interkompreno. Esperanto donus tiun kompreneblecon. Ĉiu samideano kiu havas rilatojn kun komercistoj devus tion multfoje montri al la membroj de komercaj ĉambroj.

La Sekretario de la Praha Specimena Foiro skribis esperante al la Melburna Komerca Ĉambro kaj tiu ĵusta petis el la A.E.A. tradukon. Se multego de tiaj leteroj estos sendata el la eksterlando, la Ĉambro ne povus ne scii la valoron de Esperanto.

Gazetoj Ricevitaj.

Belga Esperantisto, nov.-dec.; Brazilia Esperantisto, sep.-dec.; Nova Eŭropo, jan.; Espero Teozofia, jan.-feb.; Espero Katolika, feb.; France Esperanto, (51 rue de Clichy, Paris), Anstataŭas "Franca Esperantisto." N-ro. unua-jan.; Katolika Mondo, n-ro 6; Libero, feb.; L'Esperanto, jan.; La Espero, jan.; Progreso, jan.-feb.; Sennacieca Revuo, feb.; Skolta Esperantista Ligo, 3a Bulteno, jan.

ESPERANTO BOOKS.

Complete stock of Esperanto Books for the first time in Australia.

This month's special parcel:

Lauraj (Collection of the prize-winning works of the first literature competition of "La Revuo").

Tri Angloj Alilande.

Bardeli kontraŭ Pickwick.

La Litadmonoj de Sino, Kodel.

Aladin.

This collection only 5/- post free. Send for price list to

PYKE'S BOOKSHOP,

212 Swanston Street, Melbourne.

KABE'S ESPERANTO DICTIONARY, wanted to buy. Quote price to "A.B.C." Box 1367, Eliz.-st. P.O., Melbourne.

Kiu sendas al mi 25-100 p.m. de sia lando, ricevos same tiom da Germanaj aŭ aliajn. Carl Kueper, str. Graf-Adolf, Dusseldorf 3, Germanujo.

Al Niaj Subtenantoj.

Dum la monato ni ricevis kelkajn respondojn de niaj abonantoj rilate ĉia peto, ke ili renovigu siajn abonojn, sed multaj ankoraŭ jam ne sendis. Ni tre dankas tiujn, kiuj faris donacojn, kiuj estis tre akceptindaj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—E. A. Pryke, 4/6; R. Rawson, 4/6; H. Pudney, £1/2/6; G. McPhee, 5/6; G. Gordon, 4/-; F. Hennessy, 4/6; G. D. Kvarestrom, 10/-; H. Pallentyne, 3/-; S. Giles, £1; E. K. Blythe, 4/6; L. W. Saw, 10/-; W. R. Browning, 5/-; F. H. Hepworth, 2/6; F. J. Williams, 5/-; A. Douglas, 4/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Mörphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 28. Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio. 10 Oktobro, 1922.

SCHOOL CHILDREN WISH TO LEARN ESPERANTO.

A well-organised campaign among the school children of Dresden has resulted in 1200 boys and girls between the ages of 11 and 13 being taught Esperanto in 36 classes in the various elementary schools of that city. The parents have to pay a moderate fee, but it is hoped that eventually the teachers' salaries will be paid by the school authorities.

ALBANIA TO TEACH ESPERANTO IN SCHOOLS.

The Government of Albania has officially informed Dr. Privat, President of the recent conference held in Geneva concerning the teaching of Esperanto in public schools, that the Ministry has decided to make Esperanto a compulsory subject in all second grade, upper and commercial schools.

CONGRESS REPORTS.

The proceedings of the Finland Congress were very fully reported in the daily papers, especially *Uusi Suomi* and *Hufvudstadsbladet*, which each devoted several columns daily to the Congress reports in the Finnish language, and also reported in Esperanto the addresses by Professor Setala and Professor M. Soininen, a former member of the Finnish Ministry, who addressed the Congress at the instance

of the present Minister of Education. Each day's programme, appeared in these papers in Esperanto. Two of the weekly magazines that have reached us contain articles in Esperanto, and in one of them every article in the issue has the title both in Finnish and Esperanto.

THE XIVTH. WORLD CONGRESS OF ESPERANTISTS.

The Committee of the Congress at Helsingfors issued members' tickets to 1039 persons from 32 countries, about 900 of whom were in attendance when the Congress was opened by S-ro. V. Loimaranta, Minister of Education for Finland. Speaking in the Finnish language, he welcomed the visitors to the Congress, and concluded his remarks by a few sentences in Esperanto. S-ro. K. von. Frenckell was elected President, and S-ro. A. Sandstrom and Dr. E. Privat, Vice-presidents.

On taking the chair, S-ro. von Frenckell thanked the local congress committee for their painstaking and satisfactory work in preparation for the Congress. He also thanked S-ro. Stahlberg, President of the Republic of Finland. He saluted Sinjorino Zamenhof, and thanked her for participating in the Congress.

Professor Dr. Emil N. Setala then read a paper on the problem of World Language. After pointing out that scientists must have access to the

literature, not only of the great cultured nations, but of many others, and that in one short life, which should be devoted entirely to the service of science, it was necessary for the purposes of many sciences to devote much time to the study of language, he remarked that even then much valuable information would remain unavailable owing to linguistic difficulties. Thus the need of a common language for science was always urgently before us. After analysing the claims of existing languages—especially English—Professor Setala showed that the world language must of necessity be what has wrongly been described as an artificial language, for if any existing national language were chosen, the very fact that people of the whole world would use it would soon cause it to lose that which had made it characteristic of the nation whose language it was. Every national language should be spared the mutilation it would undergo if it were to be used by all nations which knew it only imperfectly, and whose manners of thought were totally different from those of the people whose mother tongue it was. National languages should be spared as the sacred property of the nation. As an international help language, one should select a language freely imitating the national languages, but not so closely that its use would in any way injure them. Professor Setala concluded by saying: "By that I do not mean to say that an international help language so constructed would not, in the hands of an expert endowed with the linguistic sense, become a means for the expression of the beauty of human thought in a setting of verbal beauty, and so vibrate the chords of the human heart. That is essentially outside the primary aim of an international help language: it is something which will result automatically when the situation arises."

The President thanked the Professor, and said that the speech of so famous a scientist and philologist gave us valuable arguments to combat any still existing doubts regarding an "artificial language."

D-ro. Kolomano de Kalocsay then declaimed the following "Kongresa Runo," a poem specially composed by him for the occasion:—

KONGRESA RUNO.

Vokas voĉ' de Vainamoinen,
Vibras vok' en vaga vento
Kaj ĝin muĝas malproksimaj
Montoj, maroj murmurantaj.

La potencia praa patro
De la kantoj karesantaj,
La bravulo kun la brila
Balaanta blanka barbo
Kaj ĉe l' koro kun kantelo
Kies kordoj sorĉe sonas,
Ravon semas en la sinoj:
Vainamoinen vekiginta
Vigle, veke, varbe vokas,
Logas li al land' de l lagoj
Kun la filoj festi frate.

Vibras voĉ' en vaga vento:
Sonĝis mi en sankta sino
De Suomi kaj ripozis
En la revoj, rememoroj
De la idoj inspiritaj.
Sed min vekis vok' de l' tempo.
Min el muska tero tiris
Sorĉaj sonoj sonorantaj.

Miri venis mi miraklon:
Patrolingvon de la Mondo:
Lingvon, kiu liutsone,
Lule ludas sur la lipoj,
Flate, flustre, flirte flugas.
Dolĉon donas dorlotante,
Muĝas, kiel mar' majesta,
Kun titana tono tondras:
Ideala inda ilo,
Instrumento konkuranta
Kun la kordoj de kantelo.

Miri venis mi miraklon,
Fablان forton fepotencan,
Kiu tegas tutan teron
Kaj por arda amo armas,
El la disaj, dividitaj
Gentaj grupoj glore formas,
Fandas fratan familion,
Ravan rondon sub radioj
De l' eterna esperstelo.
Ege ehu elementoj,
Resonadu regionoj
Vekan, varban, vokan, voĉon
De la nobla nova sento!

Helpi venis mi heroojn,
Helpi homojn hederindajn
En la brava batalado
Por la bono, por la beno
De la mondo baraktanta.
Kantu, kordoj de kantelo
Ilin inde invitante

Al la kampoj kalevidaj.
 Am-armeo! Amasiĝu!
 Armu vin per arda amo!
 Festu frate kun la filoj
 Kaj sen laco laboradu!
 Luktu firme, forte, fajre
 Kaj sufoke kaptu kole
 Tiun urson ulnounge,
 Monstron de la Mortolando:
 La militon malicegan.
 Kreu kuna konstruado
 Novan, sanktan, savan Sampon
 Mir—miraklan muelilon
 Por mueli la malamon
 Mondon monstre mordadantan.
 Fine idoj inspiritaj,
 Kiel iam Ilmarinen,
 Forĝu firman firmamenton
 Kun ĉielaj ĉiuj ĉarmoj
 Dian pompan mondpalacon:
 Pian pacon paradizan
 Kun la dolĉaj didonacoj
 De la fabla feliĉego.

Al la land de l' mil' da lagoj,
 Muskaj montoj murmurantaj
 Vetflugante kun la vento
 Vokis voĉ' de Vainamoinen.

In thanking the author, the President remarked that it would be no longer possible to say that Esperanto was not a fitting vehicle for poetic expression.

Then followed a speech by Dr. E. Privat, who said that Finland was the first State in which our movement had received official attention from a Parliament. He reviewed various criticisms of Esperanto, such as the assertion that the movement aimed at destroying national culture and at causing disunion between language and country, and showed that these criticisms were those of misinformed or maliciously-inclined opponents. He defined Esperanto culture as culture based on respect and love of the different nations, and based on reciprocal brotherhood.

Among the telegrams wishing the Congress success was one from the New Guinea group at Rabaul.

It was then announced that official delegates were in attendance representing the International Labour Office, Geneva; International Red Cross, Geneva; Union of International Asso-

ciations, Brussels; the Ministers of Public Instruction for Bulgaria, Czecho-Slovakia, Esthonia, Spain, Holland, and Lithuania; the Minister for Internal Affairs, Germany; Chief Inspector of Railways, Russia; Government of Uruguay; Town of Milan, and the Fairs of Finland, Frankfort, Leipzig and Prague.

LA JARA KUNVENO DE LA A.E.A.

Ĉi tiu kunveno okazis en la kunvenejo de la Melburna sekcio de la Asocio, vendredon, 29 de septembro.

Prezidis S-ro. A. R. Cohen, la vicprezidanto, kiu diris, ke por la unua fojo depost la starigo de la asocio forestas ia propono por fari ŝanĝon en la konstitucio. Dum la jaro multaj novaj anoj aliĝis kaj la nombro de personoj kiuj interesiĝas en Esperanto daŭras grandiĝi.

La Sekretario legis la raporton, kiu montris, ke en la pasintaj dekdu monatoj gratulindaj rezultatoj estas atingitaj. Nun ekzistas deziro ĉe ĉiu sekcio de nia loĝantaro, speciale instruistoj, aŭdi faktojn pri Esperanto. Pli ol 50 ŝtataj instruistoj nun studas la lingvon, kaj iuj instruas memvolajn lernantojn. La Asocio klopodis, ĉe la Universitato por la enlaso de Esperanto kiel dua lingvo egale kun aliaj, en la ekzamenoj por eniri en la ŝtatan servon, sed ĝis nun nenia decido estis farita.

La vendo de libroj superis tiunde la antaŭa jaro, kaj indikas ke multaj samideanoj tiel bone posedas la lingvon, ke ili ŝatas legi la verkojn trovatajn en nia konstante kreskiĝanta literaturo.

Kvankam la procedoj estis atente aŭskultataj, ili ne vekis ian entuziasmon, sed tiuj povas esti pro la foresto de io diskutebla kaj pro plena kontento kun aferoj tiaj, kiaj ili nun estas.

SENKULPIGO.

Burĝo estis malkontenta pri la decidoj de la vilaĝa konsilantaro kaj indigne diris: La duono el la konsilantaro estas azenoj. Devigite tion repreni, li faris tion jenforme: Mi bedaŭras mian riproĉon kaj deklaras, ke la duono el la konsilantaro ne estas azenoj.

LA PERLOJ DE FINNLANDO.

La fantomo de la lastjara kongresa ekskurso svebis antaŭ niaj okuloj, kiam oni invitis nin al la vojaĝo al Imatra. Lastjare ja multajn ĉagrenigis, ke la ekskurso daŭris unu tagon kaj nokton, kaj oni moke diris, ke la finnaj samideanoj espereble ne faros ekskurson al la norda poluso, kaj jen oni anoncis al ni ekskurson, kiu postulas eĉ du dumnoktajn vojaĝojn.

Kaj tamen estis pli, ol cent kuraĝaj partoprenintoj, kiuj forlasis en du grupoj Helsinki sabate vespere. Nun, reveninte ni povas konfesi, ke malgraŭ la por kelkaj neoportuna dormado aŭ eĉ maldormado dum la vojaĝo, la ekskurso estos por ni neforgesebla travivaĵo kaj ni povas nur ĝojegi, ke ni povis propraokule rigardi la perlojn de Suomi.

Jam la urbeto Viipuri kun la malnova kastelo, kun la ronda turo kaj kun la multaj malnovaj lignaj kaj same multaj modernaj ŝtonaj domoj donis rekompencan por la tro frua leviĝo, dum la vagonaro haltis en ĝia moderna stacio. La bona organizo de la finnlanda movado montriĝas, ĉar en ĉiuj, stacidomoj ni vidis la afiŝon pri la delegito de UEA kaj pri la kongreso.

Por entuziasmaj esperantistoj ne ekzistas malbona vetero. Kvankam preskaŭ konstante pluvis dum la ekskurso post nia alveno, ni povis admiri la finnajn pejzaĝojn kaj ekkoni la misteran internon de tiu antaŭe nur en nia imago vivanta lando.

Ni estus povintaj dum horoj stari aŭ sidi ĉe la rifoj kaj ŝtonegoj apud kaj inter kiuj trabruegis muĝeganta, kvazaŭ boleganta, saŭmanta kaj ondiga fluego de Imatra kaj Vallinkoski kaj rigardi la akvoamason bruegantan kaj zumeĝantan. Ŝajnis al ni, kvazaŭ misteraj subteraj fortoj volus ĉielen ĵeti milionojn da perlojn kaj ia sorĉa mano vaporigas ilin kaj reĵetas en la profundon, por ke ili pluen ondu, klopodu kaj suprenintencu, ĝis ĉiuj atingas sian celon: kiel vaporo, forflugi al la ĉielo. Aŭ estus ribelantaj animoj, kiuj batalis unu kontraŭ la alia kaj frakasas la aliajn neniigante samtempe ofte eĉ sin mem. Jen en profundo ĉiam ŝaŭmis blanke, kvazaŭ blanka lafo bolus tien kaj dezirus eksplodi aŭ kvazaŭ ia sorĉistino kuirus tie

en nevideblaj kaldronoj ian misteran fluidaĵon, kiu eble la eternan vivon donos, kiel eterne leviĝas samloke la vaporoj, la gutoj kaj la ondlangoj, lavante unu la alian kaj levante alten la naĝantaj stipojn kaj trunkojn aŭ ĵetante ilin al la pordo sub eterne verdaj pinoj. Jen amasego sieĝis remparon de rifŝtonego, kiu senvorte skeptike aŭ malamike kontraŭstaras kaj eble ne sentas, ke la bruegaj akvopafoj tamen fine distordas, forpoluras ĝin, ke ĝi tamen devas cedi kaj doni lokon, por ke la amasego diversa sed unucela atingu la vojon al la lago, kie renkontiĝas ĉiuj akvoj el ĉiuj regionoj por jam milde susurante frate kune plaŭdeti kaj forgesi, ke ili kunvenis el diversaj regionoj.

Per aŭtomobiloj dum kelkaj horoj ĉiuj ekskursantoj povis viziti la imponan akvofalon de Vallinkoski kaj post mallonga fervoja vojaĝo ni pasigis kelkajn belajn horojn sur la lago de Saima, kiun ni traveturis per komforta ŝipo kaj la ofte rakontita finna lago kun centoj de verdaj insuloj fabelaj pretersvebis antaŭ niaj okuloj. La pluveto ofte eĉ ŝajnis, kvazaŭ la jam aludita fekurteno, tra kiu ni rigardas belaĵojn por la aliaj homoj nevideblajn kaj mirindajn.

Alveninte en urbeton malgrandan sed ŝajne karakterize finnan, do ankaŭ ekkonindan, ni baldaŭ povis reiri en la samaj vagonoj, kiuj jam portis nin al Imatra kaj post nokta vojaĝo ni atingis nian hejmurbon Helsinki. Aŭ pardonu, Helsinki ja ne estas nia hejmurbo, kaj kiam ni plenaj da impresoj majestaj kaj kun ĝojo surpasis la pavimon de nia kongresurbo, kun malserena vizaĝo ni konstatis, ke la sonĝo alvenas al la fino kaj ni devas disiri por daŭrigi la seriozan laboron.

Sed la akvofluo majestaj ankaŭ nur tion pruvis, ke la forta volo, la organizita amaso kaj la klopodo al la supro, eĉ se nur per longa, batalplena vojo, tamen atingas la celon kaj eĉ dumvoje suprenĵetas perlojn brilantajn. Kaj la perloj de nia movado eĉ restas por ni kaj ne malaperas, kiel la akvogutoj de Imatra.

PAULO BALKANYI
el Budapeŝto, Hungarlando.

(La supra artikolo aperis en "Uusi Suomi" finna tagĵurnalo, je 15 aŭgusto, la oka tago de la Kongreso.—Red.)

KRONIKO.

WHANGAREI, Nov-Zelando. — La grupo konstante progresas. S-ro. P. Whittle, nun loĝas en Cambridge. Li estas tre agema kaj propagandema, tiel oni esperas ke nova grupo nov-zelanda baldaŭ aperos. Lastatempe S-ro W. H. King gajnis la B.E.A. Diplomon, kiel ankaŭ S-ro. Roderick Ross, el Palmerston N.

WILLIAMSTOWN, V. — S-ro. G. Redfern parolis antaŭ la "Presbyterian Ladies' Guild." Ĉirkaŭ 20 ĉeestis. La paroĥestro, post la parolo diris, ke li estas tre kontenta aŭdi pri Esperanto kaj mem decidis studi ĝin.

MORELAND, V.—Dum konveno de la loka filio de la A.N.A., S-ro. Redfern menciis Esperanton. La 26 membroj ĉeestantaj estis tre entuziasmaj. Ili aĉetis 30 malgrandajn lernolibrojn.

NORTHCOTE, V.—Ĉi tiu grupo senĉese kreskas. Laŭ la programo, kiun oni aranĝis por la venontaj tri monatoj la membroj faros grandan progreson se ili regule ĉeestos kaj partoprenos en la arangitaj ekzercoj.

FINNAJ KANTOJ.

La gazeto Ilkka publikigis kelkajn tradukojn de finnaj kantoj kiel saluton al eksterlandaj gastoj. Inter ili estis la subaj:—

KANTO DE SUOMI.
(Suomen laulu.)

Aŭdu sorĉe kanto sonas
muskaj montoj vortojn donas:

jen la Suomi-kant'!
Aŭdu, zumas floraj valoj,
bruas pinoj, akvofaloj:
jen la Suomi-kant'!

Ĉie ĉio sonas kante,
alvokante, allogante:
jen la Suomi-kant'!
Frato, se vi koron havas,
kiun la beleco ravas,
jen la Suomi-kant'!

FINNA POPOLA KANTETO.
(Yksi ruusu).

Unu rozo kreskadis en verda val'
kaj bele briletis en sun',
aliris vagulo kaj vidis ĝin,
kaj forgesi ne povas nun.
Volontege li estus rompinta ĝin
alpremonte al sia kor',
sed ne havis kuraĝon la malriĉul';
li ĝin lasis kaj iris for.

Trad. G. J. RAMSTEDT.

LABOUR AND ESPERANTO.

La Sennacieca Revuo, kiu nun prezigas 5000 ekzemplerojn, en artikolo el Usono, diris, inter alia,—Ankaŭ Geo. Williams revenis el Moskvo, eldoninte pamfleton kontraŭ la bolŝevika registaro. . . Nur unu por ni jam esperantistigitaj laboristoj interesa afero troviĝas, en lia pamflet la jena: li ĉeestis la trian Internacion kaj plendis pri la malbonaj tradukaĵoj el la diversaj lingvoj en la anglan! Li konstatas ke la tradukistino el la rusa lingvo sciis la anglan malpli bone ol Nov-Jorka knabineto el fremdlando, loĝanta tie ĉi ses monatojn! Li diras ke nur lingvosciistoj . . . povis bone kompreni la decidojn kaj ce'ojn de ia kunvenintoj. Sed nek anglo nek franco zorgas multe pri alia lingvo. Post tiaj gravaj kaj justaj plendoj pri tiu ĉi afero, li tute forgesas solvi la problemon laŭ nia vidpunkto, ĉar nenie en sia libreto li mencias, ke per Esperanto, angla kaj franca laboristo povas tre bone interparoladi kaj pridiskutadi la plej gravajn aferojn por la laborista klaso.

RECENZOJ.

BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj. Kvara eldono, jaro 1922/23. Eldonis Bohema Esperanto-Servo en Moravany (Ĉsl). 74 pĝ. Prezo: 1,50 sv. fk., por malbonvalutaj landoj 0,75 sv. fk.

Ĉi tiu estas la kvara jara apero de tiu ĉi libreto. Ĉiu ekzemplero enhavas kuponojn, per kiuj la aĉetintoj povas fari malgrandajn aĉetojn en Moravany. (C.W.B.).

LA PAGIO DE L' REGINO. De Eugen Heltai kaj Emil Makai. Tradukis D-ro. Koloman de Kalocsay. El la hungara literaturo. 31 pĝ. Havebla ĉe P. Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 15.—Prezo: 1 resp. kup. aŭ egalvaloro, kvar ekz. por 1 sv. fk., por orienteŭropanoj 7 gmk.

Ĉi tiu komedio estis ludita dum la postkongreso, 1921, en Budapest. La nomo de la tradukinto certigas, ke la teatraĵeto estas tre bonstile tradukita. La roloj estas por tri viroj kaj du virinoj. (C.W.B.).

La Plej granda komunista organizaĵo en la mondo. Biblioteko de Teristo. No. 3. Plena priskribo de la duhobora komunumo. La komunuma sistemo ne estas tre alloga al la plejmulto. (C.W.B.).

A TRANSLATION EXERCISE.

Readers are invited to send us translations of the following piece before the 30th November. The one that the Editor deems to be the best will be published in the December "Suda Kruco."

For about an hour nothing was uttered but words which are almost an equivalent to nothing. The gentleman had not yet spoken; the ladies, with loud vociferations, seemed to talk much without thinking at all. The gentleman, with all the male stupidity of silent recollection, without saying a single syllable, seemed to be acting over the pantomime of thought. I cannot say indeed that his countenance so much belied his understanding as to express anything. No, let me not do him that injustice; he might have sat for a picture of Insensibility. I endured his taciturnity, thinking that the longer he was in collecting, adjusting and arranging his ideas, the more would he charm me with the tide of his oratorical eloquence when the materials of his conversation were ready for display. But alas it never occurred to me that I have seen an empty bottle corked as well as a full one. At length the imprisoned powers of eloquence burst through, and he remarked with equal acuteness of wit, novelty of invention, and depth of penetration, that we had had no summer. Then, shocked at his own loquacity, he double-locked the door of his lips.

FLUIDIGO KAJ FANDADO DE BAZALTO.

Bazalto (bluŝtono) estas admirinda konstrumaterialo, sed la kosto de ĝia prilaboro kelkfoje faras ĝian uzon senprofitita. Tiel la anonco, ke D-ro. Ribbe, el Avergne, Francujo, sukcesis fluidigi kaj fandi ĉi tiun rokon ne estas de malgranda intereso, tio estas, se

tiuj procedoj estos sufiĉe malmultekostaj por fari ilin komerce profitdonaj, ĉar kompreneble per sufiĉo de hejto bazalto ĉiam estas fluidigebla. Detaloj pri la procedo de D-ro. Bibbe estos atendataj kun intereso. Oni povas rememori, ke bluŝtona "lano," produktata de ŝpruĉiganta bazalto fluidigitan sub forta premado, estas fabrikata en Melburno depost kelkaj jaroj. Oni diras, ke ĝi estas admirinda materialo por hejtizoligo. Rilate al fluidigita ŝtono estas eble interesa rememori la fakton, ke kvarco estas fluidigebla kaj eltirebla en fadenojn pli maldikajn ol tiuj, kiujn ŝpinas la araneo. Ĉi tiuj kvarcaj fadenoj estas fortaj kiel ordinara ŝtalo de egala diametro kaj ilia elasteco estas pli granda, ol tiu de ŝtalo. Ili estas uzataj en sciencaj instrumentoj, tiaj, kiaj mezuras la tiradon de pezeco per malgranda globo pendanta apud granda maso de metalo.

1923 CONGRESS WILL BE HELD IN NUREMBERG.

The last duty of the Fourteenth Congress was to decide where next year's meeting shall be held. It was generally known that representations in favour both of Warsaw and Vienna would be made, but scarcely anyone had an inkling that an invitation would be forthcoming from Nuremberg. However, the proposition from Nuremberg was the first submitted. Then the president of the Polish Esperanto Society explained that, although the First Polish Esperanto Congress had decided to invite the Fifteenth Congress to Warsaw, it was now found that conditions were not favourable. They did not withdraw the invitation, but asked that it should be considered later. S-ro. Fiby, who had been commissioned to advocate the claims of Vienna, had already left on his return journey, so the invitation to Vienna

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

was made by deputy. Dr. Privat urged a unanimous acceptance of the invitation to Nuremberg. He reminded those present that the first Esperanto booklets and the first Esperanto periodical, "La Esperantisto," were printed there, and that Nuremberg was the home of the first Esperanto group. Historic associations would not be the only attractions. The town was charming, with interesting towers, old town walls, and beautiful surroundings. The invitation was unanimously accepted, and the president congratulated the German Esperantists and wished them every success. So Esperantists the world over are now looking forward to their next reunion—the fifteenth—in Nuremberg.

"INTERNACIA MONDLITERATURO"

POR LA TUTMONDA ESPERANTISTARO.

Kion ni devas legi?! Estas certe, ke ĉiu, iomete progresinte rilate la lernadon de "nia lingvo", bezonas la legadon de internacia literaturo, ne tradukaĵojn el sia nacia literaturo. Nia principo ja estas: Kun niaj samnacionoj ni parolu la gepatran lingvon, kun alilandanoj Esperanton, la neŭtralan mondhelplingvon! Do, jam pro tio neniu volonte legos la verkojn de sia nacia literaturo Esperantigitajn. Eble li faros tion pro la lingva ekzercado, pro lingva intereso, sed ne por havigi al si la ĝuon, kiun prezentas la originalo. Estas ankaŭ iomete danĝere, ĉiam legi Esperanto-tradukojn de samnacionoj, ĉar tiamaniere oni ne fariĝos tute lerta, perfekta Esperantisto. kiu scipovas eviti lingvajn naciismojn, tiamaniere oni ne akiros internacian stilon. Multe pli rekomendinda kaj preferinda estas la legado de verkoj, Esperantigitaj per samideanoj el aliaj nacioj. Sur ĉi tiu vojo nia stilo, nia vortfarado pliboniĝos, "nia Esperanto" fariĝos vere internacia. Kaj: legante la verkojn de alinacionoj ni enpenetros en la literaturon, kulturon, kutimojn, movojn, vivon de aliaj popoloj. Tio estas nepre necesa, por ke ne nur ekstere, sed ankaŭ interne fariĝu homoj "homanecaj," kiuj povas senti kaj pensi kun la homoj de aliaj popoloj.

Dum la Geneve-a konferenco mi jam

publike—kaj konsentite de ĉiuj ĉeestantoj—aludis la necesecon, krei entreprenon, per kiu ni povas ricevi por niaj kursoj, por niaj lernejoj, por niaj propraj liberaj horoj la plej bonajn verkojn de aliaj nacioj, bone Esperantigitajn.

Bedaŭrinde la fame konata firmao Hatchette & Cie. en Paris ne plu eldonas Esperantaĵojn. Des pli salutinda estas la cirkonstanco, ke unu de la plej grandaj germanaj eldonejoj, la firmao Hirt & Sohn en Leipzig, montras grandan intereson por nia movado; ĝi jam eldonis bonajn Esperantaĵojn kaj ĝi jam antaŭ kelkaj monatoj konsentis mian planon, krei specialan fakon por "Internacia Mondliteraturo." Mi proponis jenajn principojn:

1. Oni akceptu nur verkojn, kiuj estas vere valoraj de sur literatura vidpunkto! Ĉu iu verko estas tia, pri tio decidu la samnacionoj mem de la elektota verkisto.

2. Oni komisiu la tradukon de iu ajn verko nur al ano de la sama nacio, al kies literaturo la verko apartenas!

3. Oni zorgu, ke kiel eble plej multaj—se eble ĉiuj civilizitaj—nacioj estu reprezentataj en la entrepreno de "Internacia Mondliteraturo"!

4. Oni komence elektu—por atingi la celon de la 3-a punkto—ne tro longajn verkojn!

5. Oni eldonu en unu volumo nur verkojn de unu aŭtoro kaj nomu la volumon laŭ li, ne laŭ la tradukinto,, kio ŝajnas al mi tre malaprobinda kutimo.

6. Oni komence ne entreprenu tro multon, t. e. oni ne traduku ĉiuspecajn verkojn, sed—tion mi proponas pro la nuna stato de nia movado—nur beletristikajn verkojn, ekz. novelojn, rakontojn, mallongajn romanojn k. c. Pli malfrue oni ja povas decidi pri la traduko de ekz. ĉiuspecaj sciencaj verkoj k. a.—

La firmao Hirt & Sohn komisiis min, kiel direktoron de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, zorgi pri la efektivigo de la ideo de "Internacio Mondliteraturo" por la tutmonda Esperantistaro.

Mi des pli volonte agos laŭ ĉi tiu komisio, ĉar mi mem jam de longa tempo treege deziris tian entreprenon. Ni celas per ĝi tute alion, ol kelkaj alilandaj samideanoj, kiuj volas disvastigi la literaturon de sia propra lando,

por disvastigi la kulturon de sia lando. Ankaŭ aprobinda entrepreno, sed tute malsama! Ni volas disvastigi la tutmondan kulturon per la literaturo de kiel eble plej multaj landoj. Pro tio mi ĝojus, se mi baldaŭ ricevus respondojn, ĉu samideanoj el ĉiuj negermanaj nacioj volas helpi, por ke ni ricevu el ĉiu popolo kaj ĉiu literaturo valorajn verkojn Esperantigitajn, taŭgajn por nia celo. Kompreneble la firmao laŭdece rekomencos la laŭron de la tradukantoj.

Mi petas, ke ĉiuj, kiuj volas partopreni al nia laboro, nepre necesa por la Esperantistaro, anoncu sian nomon kaj samtempe skribu, kion ili volas traduki. Estas plue rekomendinde, ke ili (se ili ne jam estas konataj kiel lertaj tradukistoj kaj Esperanto-stilistoj) poste sendu parton de sia tradukaĵo, laŭ kiu oni povas juĝi pri ilia lerteco; ĉar ni povas akcepti nur bonajn tradukojn. Sed certe en ĉiu nacio troviĝos sufiĉe da tiaj tradukistoj. Ĝis nun ni jam ricevis promesojn de kunlaborantoj el diversaj landoj. Helpu, por ke ni baldaŭ havu vere "internacian" kolekton, kolekton reprezentantan ĉiujn naciojn.

PROFESSOR D-RO. DIETTERLE,
Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Post multaj klopodoj S-ro. A. Robin fine decidigis "les Petits Bonshommes" akcepti kurson pri Esperanto por iliaj legantoj. "Les Petits Bonshommes" (1 rue Desiree, Paris-20e) estas interesa porinfana revuo semajna, kiu eldoniĝas 10,000-ekzemplere, kaj estas konata tra tuta Francujo. La kurso daŭros dum 2 aŭ 3 monatoj. Kredeble multnombraj estos la junaj francoj, kiuj lernos Esperanton, ĉar la kurso estos kiel eble plej amuza. Fakte ĝi estos ludo, ne studo.

GAZETOJ RICEVITAJ.

AMERIKA ESPERANTISTO, jun., jul.-aŭg.; BULLETIN de S. Francaise P. E.; jul.; ESPERO KATOLIKA, jun., jul.; ESPERO TEOZOFIA, maj.-aŭg.; ESPERANTISTA JUNULARO, jun.-jul.; ESPERANTO FINNLANDĜ, jun.-jul.; EXPORT ESPERANTIST, jul.; ESPERANTO TRIUMFONTO, n-roj. 91 ĝis 98; FRANCE ESPERANTO, jul.; INTERNACIA KOMERCA REVUO, jul.; KATOLIKA SENTO, nova monata revuo, S. -Luca, Corte Scotti, 4568, Venezia, parte Esperante, parte Itale, jul.-aŭg.; LA KONKORDO, jun.; KATALUNA ESPERANTISTO, jun.-jul.; KATOLIKA MONDO, n-ro. 2, KRISTANA ESPERO, mar.-jun.; LA POLICISTO, nova fakĵurnalo, Budapesto, 41, poŝtkesto 255, aperas en ĉiuj ses semajnoj, 8 s 4p jare; maj, aŭg.; L'ESPERANTO, jun., jul.-aŭg.; LA PROGRESO, jul.; LA SEMISTO, maj-jun.; LA VERDA OMBRO, maj.; LA UNUIGITA TUTHOMARO, maj-jun.; LITOVA STELO, jul.; LE MONDE ESPERANTISTE, maj-jun.; BULLETIN DE LA SKOLTA ESP. LIGO, jun.; SENNACIECA REVUO, jul., aŭg.-sep.; TERISTO, jun., jul., aŭg.; VERDA UTOPIO, jun.

AL NIAJ SUBTENANTOJ,

Ĝis la 10 oktobro ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—A. Porter, 4/6; F. Cherrett, 4/6; Nigra Cigna Grupo, £2/2/6; T. G. Goss, 5/; J. M. Dowsett, 5/; A. E. Church, 5/; T. L. Wiltscheibe, 4/6; H. Byatt, 4/6; E. McKenzie, 4/6.

S-ro. W. Kucernko, Leo Tolstoj 50, Bender Tighma, Besarabia, Roumania, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiu lando.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasia Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne.

By The Imperial Press, Printers, 395 Elizabeth Street, Melbourne.

La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia
Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio:

BOX 1367, ELIZABETH STREET P.O., MELBOURNE
(AUSTRALIO).

N-ro 30. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Decbr., 1922. Price 4d.

The Australasian Esperanto Association.

AFFILIATED GROUPS.

- Belgrave.**—(E. Grupo). Fino S. Giles.
"Warawing," South Belgrave.
- Brisbane.**—E. Klub. Sro. Sycamore.
"Bonveno," O'Mara St., Lutwyche,
Brisbane.
- Hobart.**—Esperanto Society, Sro. E. F.
Heritage, 35 Risdon St., Newtown,
Hobart.
- Melbourne.**—Hardware Chambers, 350
Little Collins St., Friday, 8 p.m.
Rationalista Esperanta Grupo,
Temperance Hall, Melbourne.
- Mont Albert.**—Sek., Fino E. K. Blythe
10 Victoria Ave., Surrey Hills.
- Northcote.**—(La Verda Stefo). Sek.,
Sro. G. Delaney, 16 Gordon Grove,
Northcote.
- Oakleigh.**—(Iru Antaŭen). Sek., Sino.
R. Bigelow, Kangaroo Rd., Oak-
leigh.
- Rabaul.**—(Nov. Guinea, E. Grupo). Sro.
P. Simon, Rabaul, New Guinea.
- Sandringham.**—(Marborda Grupo).
Fino M. Hollow, "Porteath," Bam-
field St., Sandringham.
- S. Australia.**—Esperanto Society, Sro.
W. L. Waterman, 20 Henley St.,
Torrensville, S.A.
- Sydney.**—Esperanto Society, Sro. L.
Foster, "Edna," Chiswell Parade,
Campsie, N.S.W.
- Townsville.**—Esperanto Society, Sro.
Chas. Price, School of Arts, Stan-
ley St., Townsville.
- W. Australia.**—(Nigra Cigna Grupo).
Fino F. Cherrett, 45 Leonard St.,
Victoria Park, Perth, W.A.
- Whangarei.**—Sro. W. H. King, P.O.
Whangarei Nth., Auckland, N.Z.

Chocolate Bowl Sweets.

Made Specially for "My Lady's" delectation. Available in choice and exclusive varieties daintily packed. Phone your next order, or write for particulars of these "Made-to-Day" Sweets. We supply quantities to suit individual requirements.

ASK FOR

Chocolate Bowl Sweets at Confectioners—All Suburbs.

Esperanto entrepreno—Dezirata korespondi kun samfakanoj en Usono, Svisujo, Francujo, Rusujo, kaj Aŭstrujo, pri farado de ĉokoladaj sukeraĵoj.

18 CENTREWAY, COLLINS STREET

Telephone: Central 2210.

Universal Esperanto Association.

Founded, 1908.

Objects:

To spread the use of the international help language Esperanto.

To facilitate communication between the peoples without distinction of race, nationality, religion or language.

To institute international services available by everyone whose intellec-

tual and material interests extend beyond the limits of their own country.

Delegates in every country.

Membership, 5/- per annum, or with the monthly magazine "Esperanto," 12s. 6d.

Subscriptions for 1923 are now payable to—

O. W. BALLARD (Delegate for Melbourne and Chief Delegate for Australia),
27 Lansdowne Road, East St. Kilda, Victoria.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Gis la 7a de decembro ni ricevis la jenajn sumojn:—

L. Nesbit, 4/6; M. A. L. Hang, 5/-; S. Ruchin, 5/-; Ostler, 4/6; — Widdowson, 4/6; M. Dodd, 4/6; E. M. Wallace, 5/-; Uyeno Trading Co., 5/-; J. Mader, 5/0; J. A. Hodges, 5/-; M. Cohen, 4/6; P. Hudson, 9/-; T. O'Leary 4/6; C. L. Clarke, 4/6; — Parker, 4/6; A. L. Walford, 4/6; P. T. B. Hudson, £2/10/-; Marborda E. Grupo, 4/6; J. McKenna, 4/6; H. V. Tilbury, 4/6; A. Greiser, 10/-; A. H. Slade, 5/-; T. Corrigan, 4/6; F. Tondit, 4/6; F. Paulsen, 5/-; W. C. Dalgleish, 4/6.

Ou vi registris vian Nomon en la 5a Eldono de la Adresaro de Esperantistoj el la mondo? Baldaŭ Aperos. Tuj sendu vian nomon kune kun, 1/6 al Sro. A. R. Cohen, Box 731, P.O. Melbourne.

KOMERCA ANONCO.

Do you wish to acquire extra lines from Europe?

I have several good lines to offer, and can arrange for representation.

Agencies secured from any country.
A. R. COHEN, P.O. Box 731, Melb.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Aĥono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 30. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Decembro, 1922.

ESPERANTO IN SCHOOLS DESIRED BY N.S.W. TEACHERS.

At a meeting of the council of the Teachers' Federation of New South Wales, held in Sydney, on 25th November, the sub-committee appointed to inquire into the relative merits of the two leading auxiliary languages and as to the advisability of introducing the study of the one selected into the State system of education, presented its report. The committee found that Esperanto was the most suitable auxiliary language, that its introduction into the State schools was practicable, and recommended that the department be requested to fall in with the expressed wish of a large section of the League of Nations. It was suggested that an experimental class of pupils from 12 to 14 years of age should be formed, and placed in charge of a competent teacher. The report was adopted, and is to be forwarded to the Minister for Education.

LA PREZIDANTO DE LA A.E.A.

Oni anoncis la rezultaton de la balotado por la ofico de Prezidanto de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio por la jaro 1923. S-ro. A. R. Cohen estis elektita. Li plene meritas la honoron kaj la asocioj povas gratuli sin, ke ili havas tre entuziasman kaj laboreman gvidanton.

CONGRESS AFFAIRS.

Samideanoj,—

I wish to draw the attention of readers of the Suda Kruco to the following:—

That congress affairs are progressing very favorably in Sydney. That the committee have arrangements well in hand.

That visitors are assured of a good time.

That we intend to stage—as one of our star items—an esperanto concert, when samideanoj will be able again to show to the public that our language can be used for speech and song.

That the committee earnestly request financial assistance from every Esperantist, whether they intend coming or not.

That the success of the Kvara means much to our movement in Australasia. We must not fail, we shall not fail, if you give us the support which is due. Already we have 25 subscribers from six different States, and we require, at the least, one hundred.

Samideanoj! Who will make the 26th, etc., etc.?

Send your subscriptions or donations immediately to the secretary.

L. E. FOSTO,

Clissold Parade, Campsie, N.S.W.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Dum novembro, ĉe la Aŭstralia Instituto de la Artoj kaj la Literaturo, fraŭlino E. A. Sinnotte, kiu estas membro de tiu instituto, legis longan kaj tre interesan pri Esperanta literaturo artikolon, kiun ŝi mem verkis. Kvankam la instituto havas nenian rilaton kun la Esperanta movado, fraŭlino Sinnotte sukcesis ricevi permeson por tuta por Esperanto programo, kelkaj tre dolĉaj Esperantaj kantoj estis bone akceptitaj, kaj ankau deklamado de "Esti-au ne esti!" el "Hamleto." Sroj Hudson kaj Rawson mallonge priskribis kelkajn spertojn de siaj vojaĝoj.

Lastatempe gajnis la diplomon de la B.E.A. la sekvantaj Melburnanoj. E. S. Hanks, J. G. Pyke, Dr. F. J. Williams, P. S. Wyatt kaj la sekvantaj Nov-Zelandanoj. W. H. King, R. Ross.

POR LA U.E.A.

En la Australian Church Hall, novembro 15 an, por plialproksimiĝi al la celata aŭstralia donaco de £50 al la U.E.A., okazis koncerto kaj monkollekto, kiu aldonis £6/10/- al la jam ricevita sumo.

La koncerto malfermis per ĥora kantado de "La Vera Fratara." Sekvis tion kanto de Sro-Davidson, nova Esperantisto kun bela voĉo, kiun, esperable, li ofte levos en Esperantaj kantoj. La sekvanta ero, prezentado de dramo titolita, "Sinjoro Herkules," estis ankaŭ peno de komencantaj Esperantistoj, se oni esceptas unu sinjoron. Tre naive dolĉa estis la aktado de Fraŭlino L. Walford kiel "Anjo," ĉambristino ĉe la hotelo "Blua Simio"; Fraŭlino M. Lacey tiel bone prezentis sian malgrandan rolon de "Ernestino," modesta filino de edukeja direktoro, ke estas flustrite, ke ŝi povas teni sin preta por pli granda laboro! Sinjoro Sime, "Augusto," amanto de "Anjo" kaj servisto ĉe la "Blua Simio," havis multajn okazojn por esti komike amuza, kaj li tiujn lerte kaptis. Sro. John Roberts, kiel "Krianto," direktoro de cirko serĉanta "la Herkules de la mondo," estis vigla kaj konvinka. Sro. Percy Roberts, la hontema instruista kandidato, "Muso," kiun "Krianto" erare akceptis kiel "la Herkules de

la mondo" montris inteligentan komprenon de sia rolo. Sro. A. R. Cohen, kiu estis, "Malman," maljuna, digna direktoro de edukejo erare akceptita kiel direktoro de cirko, lerte plenumis la rolon. La lasta sed certe ne la malplej grava estis "la Herkules de la Mondo" mem "Cezaro," prenita de Sro. L. Brochie, amuze kaj Herkulese Poste, per sia bone konata lerteco. Sinjoro C. Booth ludis pianan solon. Fraŭlino M. Dowling sekvis kun tre dolĉe kantita "Melisande" esperantigita. La aŭdantaro aplaŭde petis ankoraŭ alian kanton kaj la fraŭlino kompleze kantis "Mia Verda Stelulino." La plena kontralta voĉo de Fraŭlino Bate aŭdiĝis bele en "En Kvietanta monteto" kaj "Roza Erikeja." Sinjoro Davidson bonege kantis "Vespera Stelo" el Tannhauser; la aŭdantaro postulis ke li rekantu ĝin. Per du malnove preferataj kantoj Sinjoro Brooks-Gray ĉarmis la ĉeestantojn. Ili estas "Anjo Loro," kaj "La Rompita Ringo."

La unuakta komedieto, "Ŝia moŝto Lady Fanny," kiun Fraŭlino Elsie Godfrey, kaj Sinjoroj Roy Rawson kaj George Hussey ludis, pruvis la taŭgecon de nia kara lingvo por spritaj ludoj. La temo kaj la prezentado estas tre modernaj. Lady Fanny, filino de duko, volas eksedzigi sian edzon pro tio, ke li ne aĉetos perlojn por ŝi. Li ne estas sufiĉe riĉa. Unu ero el la kulpoj kiun oni devas pruvi antaŭ ol oni povas eksedzigi edzon estas la krueleco. La edzo de Lady Fanny devas bati ŝin en la ĉesto de persono, tial li sonorigis por la ĉefservisto. Tiu persono eniris kiam la edzo batas la edzinon. Vidante la frapon, la ĉefservisto jetis la edzon sur la plankon. Estas surprizo por la edzino. Si vidas ke servisto povas esti ankaŭ viro. Unue Lady Fanny diras al li ke si kaj la edzo proviudis teatraĵon, sed poste si klarigis, ke ŝi volas eksedziniĝi. La ĉefservisto gentile proponis ke la plej facila maniero estas por la edzino foriri kun viro. Li eĉ proponis virojn inter la amikoj de sia mastrino. Fine li proponis sin mem. Lady Fanny estas korusita je la ĝentila maniero de la propono. Bedaŭrinde la ekonomio venkas. Lady Fanny devas resti kun la edzo pro la manko de mono de ŝia servisto, kaj tiu servisto devas foriri—li

ne povos resti ĉefservisto post kiam oni lernis ke li estas viro!

La festo finiĝis per kantado de "La Espero."

LA UNUA . . . EN ESPERANTISMO.

Memorindaj datoj el la historio de Esperanto.

La unua broŝuro pri Esperanto aperis en la jaro 1887 (la 26an de julio); ĝi estis rusa 40paĝa broŝuro titolita: D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Por Rusoj. Varsovio. Tipolitografeco de Ĥ. Kelter, str. Nomołpie N-ro 11. 1887. Prezo 15 kopekoj.

La unua broŝuro en Esperanto aperis en la komenco de la jaro 1888a sub titolo: D-ro Esperanto. Dua libro de l'lingvo internacia. Kajero N-ro 1. Varsovio 1888. Kosto 25 kopekoj.

La unua artikolo pri Esperanto en nacia gazeto aperis en Varsovia „Kurjer codzienny“ (Ĉiutaga kuriero) en la jaro 1887 (la 7an de aŭgusto N-ro 216) kun titolo „Antivolapuk“ kaj kun subskribo W. S. (=Wladyslaw Sabowski).

La unua esperanta gazeto estis „La Esperantisto“ eldonata en Nurnberg dum la jaroj 1889 ĝis 1895 (anstaŭta poste per „Lingvo internacia“ eliranta dum la jaroj 1896 ĝis 1915 komence en Svedujo (Upsala) poste en Hungarijo, Budapeŝto, kaj fine en Francujo (Paris).

La unua literatura traduko en Esperanto estis „La neĝa blovado“ de Puŝkin, verketo tradukita de Antoni Grabowski! La unua adresaro de Esperantistoj estis eldonata de D-ro Zamenhof, aperis dudek tri serioj parte en la gazeto, „La Esperantisto“, parte memstare kiel ĉiujaraj broŝuroj (ĝia daŭrigo estis „Tutmonda adresaro“ de Hachette eldonata de la jaro 1904).

La unua interparolo en (la nuna) Esperanto okazis inter d-ro Zamenhof kaj inĝeniero A. Grabowski (tamen la unua persono, kun kiu Zamenhof parolis sian lingvon diferencajn ankoraŭ de la nuna Esperanto, estis lia kolego d-ro Aleksandro Waldenberg—en Zakrocym 1885).

La unua Esperantista societo estis

fondita en Nurnberg, kie la tiama societo de volapukistoj ŝanĝiĝis en la societon de Esperantistoj (1888).

La unua internacia kongreso de Esperanto okazis en la jaro 1905 (de la 5 ĝis la 13 de aŭgusto) en la Franca marborda urbo Boulogne sur mer; de tiu ĉi tempo ili okazas ĉiujare escepte la tempon de la monda milito.

La unua raporto pri Esperanto en scienca institucio estis tiu de prof. d-ro E. Naville, en la franca Akademio de la sciencoj en la jaro 1899 sub titolo „La lingvo internacia“.

La unua Esperanta raporto en scienca kongreso estis tiu de d-ro Krikortz „Pri la kuracado per varmo“ prezentita al la kongreso de fizioterapio (Liege 1905).

La unua teatra prezentado en Esperanto estis organizita de Aleks. Zakrzewski en la jaro 1896 (15./27 de septembro) en Smolensk; oni ludis la komedion „Brandfaristo“ de Tolŝto; kompreneble ĝi estis ludata de dilettantoj. La unua esperanta teatra prezentado de profesiaj aktoroj artistoj okazis en Dresden dum la kvara internacia kongreso de Esperantistoj (1908); oni prezentis teatraĵon „Ifigenio en Taŭrido“ de Goethe.

La unua preĝeja kantado estis organizita de Aleks. Zakrzewski en Romkatolika preĝejo de Smolensk en la jaro 1896 (26an de oktobro.)

La unua literatura konkurso en Esperanto estis organizita en Odessa, kie Gernet redaktis „Bibliotekon.“

—(El „Nova Europo.)

S-INO. ZAMENHOF AL AŬSTRALIANO.

S-ro. Pyke skribis al s-ino Zamenhof samtempe sendante fotografajon de sia librovendejo. Responde li ricevis la jenon:—

“Estimata sinjoro, mi danke ricevis vian leteron. Mi tre ĝojas pro via laborado por nia kara lingvo en via bela lando. Mi esperas, ke nia movado ĉiam pligrandiĝos dank' al via librejo mi deziras al vi plenan sukceson. Laboru kaj esperu. Koregan saluton sendas al vi via samideanino.

KLARA ZAMENHOF.”

HARPO.

(A. Lunaĉarski.)

Mi dum longa tempo apartenis al maljuna kantoro en malgranda vilaĝo. Kie kaj kiam mi naskiĝis, mi ne memoras. Muzikiloj akiras spiritajn ecojn kaj konscion nur poste: ilia animo vekigis sole dank'al homa animo, kontaktigante kun ĝi en la reĝolando de sonoj.

Tie, en malgranda vilaĝo, en maljuna ĉambro pasis mia mizera ekzistado. Tamen, ĝi ne ŝajnis al mi tro plendinda: mi amis mian virtuozon. Li estis la unua, kiu vekis en mi belajn sonojn. Mi estis ĝoja sonori laŭte, akompanante horon da freŝaj infanaĵoj voĉoj. "Ekzistas nenio pli bela,—mi pensis,—jen estas muziko, jen estas amo". Estis nur strange, ke iujn kordojn la kantoro neniam tuŝis. La duono da kordoj sonadis konstante, klare, konscie, diversmaniere,—aliaj sonadis kaj tremis nur malofte, mi konsciadis ilin konfuzie, malprecize, ili ŝajnis al mi mizeraj, palaj. Sed kelkaj kordoj silentis,—tamen mi sciis, ke mi ilin havas..

Iun tagon mi staris ĉe malfermita fenestro. La luno lumradiis en la ĉielo; poploj trembriletis per siaj arĝentkoloraj folioj,—ilin karesis venteto kaj benis lazura lunlumo. Kaj jen la vento ekblovitis tra la fenestro kaj ektuŝis per sia spiro miajn kordojn,—kaj ili ĉiuj aŭdigis malfortan ĝemon,—eĉ tiuj ekĝemis, kiuj ĉiam silentis. Tiam mi eksopiris por momento. Ha, kiel mi eksopiris! Ĉiuj silentintaj ĝis nun kordoj ekmurmetis: "Ankoraŭ!" Tamen la vento ne tuŝis ilin plu. Sed ili volis kanti.. Ĉu la ĉirkaŭaj objektoj, ĉu la homoj komprenis, ke mi petegas, ke oni permesu al mi kanti, ke mi soifas pri sonado, ĉar mi vivas, ĝuas kaj amas?.. Ho, se mi povus eksoni per ĉiuj miaj kordoj!.. Sed, kredeble, ili estas malbelaj,—la homoj ne bezonas ilin; sole iuj estas necesaj por ili; aliajn ili tuŝas malofte, ili estas malfortaj kaj mizeraj; sed multaj, multaj kordoj estas malhejmaj por ili kaj ili evitas ilin.. Kiam la kantoro min alproksimiĝadis, mi estis ravita, mi volonte fordonadis min, kantis kaj revis: tuj li ektuŝos tiujn forrifuzitajn, ne vekigintajn kordojn. Ne,—li ĉiam evitadis ilin, obstine ludante ĉiam la samajn melodiojn. Certe,

tiuj melodioj estas perloj de beleco, triumfkronoj de muziko. Kiam dankami estas al mia virtuozo!

Iun tagon mi staris sola, enprofundiĝinta en mian duondormon de duonanimita korpo. Subite aŭdiĝis voĉoj. Uru—sonriĉa, laŭta. Eniras mia kantoro en sia flaviĝinta redingoto larĝa pantalonon, kun kalva kapo kaj larmumaj okuloj, kaj post li—altkreska maljunulo en la gloro de siaj arĝentkoloraj bukloj, kun brilaj nigraj okuloj. Potenco sentiĝas en liaj lipoj, en liaj gestoj. Li laŭte parolis.

— Vi do fariĝis kantoro, maljunulĉjo? Vi instruas kantadon al katidoj kaj hundidoj? Sur kiu muzikilo vi do kunludas?

— Jen ĝi estas,—diris gaje mia posedanto, montrante min per fingro.

— Sur harpo?—demandis la mirinda nekonatulo kaj metis sur min sian nervan manon.—Nobla instrumento, se iu scipovas ludi ĝin.

— Ĝi ne estas agordita. Mi ludas ja ĉiam la samon.

— Ĉu vi aŭdis, maljunulĉjo, mian muzikon "Ploro de Izraelidoj"? Ne? Nu, aŭskultu do.

Kaj li prenis min, ĉirkaŭvolvis per siaj varmaj manoj. Li iom streĉis kelkajn kordojn, tremetantajn sub liaj fingroj. Kaj subite,—ho, Dio! Ĉu ĝi estas mi?.. Kiaj anĝelaj ekspiroj plenigis la ĉambron, kia oro, kiaj preĝoj, kiaj puraj larmoj! Kiaj plorĝemoj versiĝis el-sub la karaj fingroj, kiujn mi kisis, kiaj profundajoj malfermiĝis!..

La sonoj kreskis, tondris.. Nun sonis venĝo: mi tuta tremis pro neniam spertita kclero, mi alvokis malbenojn.. Silentis la maljuna kantoro, silentis la homamaso sub la fenestro, tumulte leviĝadis la brusto de l'inspirplena majstro,— kaj mi sonis pro feliĉo de nova vivo. Jen do estas muziko, jen estas vivo! Jen kiaj estas la kordoj, kiujn mi mem komencis malŝati, kiuj kvazaŭ mortadis en la malluro de silento.

Kiom da feliĉo li malkovris al mi! Li ludis "Kanton de Kantoj", kaj mi ploris pro pasio, sonoris per arda varmego, tremis, murmuretis, formortante.. Li malkovris al mi tutan mondon en mi mem... Ho, vivo! Ĉi estas nemezureble bela. Ho, mia estro, reĝo, sorĉisto, mia dio!.. Kaj li diris: "De kie vi havas tian instru-

menton? Mi donacos al vi belan harmoniumon, kaj vi cedu al mi vian belulinon. Kia formo, kia voĉo. Malofta harpo!"

Kaj li prenus min.

(El la rusa lingvo tradukis. D-ro Andreo Fiŝer, L. K. (Tiflis). en "La Nova Epoko").

THE INTERNATIONAL LABOUR OFFICE.

This organisation which is attached to the League of Nations now sends reports of its activities to the press of the whole world. "Recognising the value and importance of Esperanto as a medium of intercommunication" it has been decided to send these bulletins in Esperanto to the Esperanto press.

These documents should be translated into English and published by the Labour Press. This is a matter that should receive attention from those interested in the Labour problem. The reports are filed and will be available for anyone wishing to make use of them. The space available in the Suda Kruco will not permit of publication of this information in extenso, but an endeavour will be made to summarise it.

The Budget Committee of the Third Session of the League of Nations has decided to recommend that £120,000 be voted for the construction of a building for the International Labour Office. This building will be erected on land, given by the Swiss Government, and worth £50,000.

Mr. Cesar Zumeta, Venezuelan delegate to the Third Session of the League of Nations, delivered an address to the Directors of the Labour Office. He sketched the history of industry from the early gold-seeking days, alluded to the improvement in agricultural and industrial conditions, and made reference to the immigration problem.

The Fourth International Labour Conference was held during October, under the Presidency of Lord Burnham. One of the matters dealt with was the ensuring of regular information concerning immigration and emigration, arranged according to a uniform system so as to afford easy reference and comparison.

The Conference also considered a re-

form of the Advisory Council, as some countries outside Europe had become anxious through the expense caused them through annual sessions.

The second edition of the International Labour Directory has just appeared. This volume is printed in English, French and German, and contains information, not elsewhere obtainable regarding Government departments and private organisations dealing with the Labour problem and industry in 72 countries. The book contains 1000 pages.

A recent bulletin deals with the present cost of living figures throughout the world and shows that, except in those European countries where special causes have influenced the value of their currencies, the cost of living and retail prices in the majority of countries are substantially lower than during the first quarter of this year.

Dame Rachel Crowdy, secretary of the Advisory Committee of the League of Nations, regarding the traffic in women and children, was invited to attend the sittings of the Labour Conference which dealt with the question of emigration. The available statistics do not always show the sex of the emigrant. This factor is of great importance, and indication of sex will be specially useful to the International Labour Office for the eventual application of protective measures favourable to emigrants. Accordingly, it was proposed that all States compile their information according to a uniform system in relation to sex, age, family relationship and occupation.

EL RIMOJ KAJ RITMOJ.

Se krevas kor'—el ĝiaj fendoj
Elkreskas flor' de rememor'
Trankvilaj ĝin movigas plendoj
Venen' eliras per odor...

Venen' per bonodor' eliras
El sangkolora tiu flor'...

Dum nokt' sendorma vi ĝin spiras
Serĉante ĝuon en dolor'...

En rememor' vi amuziĝas,
Je multkolora florfoli'—

Vizaĝ' paliĝas... kaj paliĝas...

Mortigas vin melankoli'...

Leo Belmont, en Pola Esperantisto.

Esperanto estas tiel harmonia kiel la itala lingvo, klara kiel la franca, sufiĉa kiel la greka.—Charles Richet, profesoro, Paris.

TRANSLATION EXERCISE.

The following translation, by Mrs. F. Trewin, of Bayswater, Victoria, is the best that has reached us.

Dum ĉirkaŭ unu horo nenio estis dirita krom negravaĵoj. Ankoraŭ ne parolis la sinjoro; la sinjorinoj, kun laŭtaj ekcrioj ŝajnis babili sen ia pripensado. La sinjoro, kun ĉiu virsekxa stulteco de silenta rememoro, nedirante eĉ unu silabon, ŝajne estis prezentanta al si la pantomimon de la pensoj. Mi ja ne povas diri, ke lia vizaĝo tiel false atestis pri lia intelekto, ke ĝi ion esprimis. Ne, mi ne faru al li tian neĵustecon; li povus esti pozanta figuron de sensebleco. Mi toleris lian silenton, pensante, ke ju pli longe li kolektas, precizigas kaj aranĝas siajn ideojn, des pli li ĉarmos min per la fluo de sia oratora elokventeco, kiam liaj konversaciaj materialoj pretiĝos por elmontri. Sed, ho ve, ne venis al mi en la kapon, ke mi estas vidinta malplanan botelon ŝtopitan tute same, kiel plena. Fine la baritaj elokventaj povoj elŝprucis, kaj, kun egale tiom de spiriteco, kiom da noveco de elpenso kaj profundo de penetro, li rimarkigis, ke ni estas ricevintaj nenian someron. Tiam, konsternite pro sia propra multvorteco, li duoble ŝosis la pordon de siaj lipoj.

SUGESTIAJ NOTOJ.

Estis dirita.—"Dirata" is better here, to emphasise the continuity.

Negravaĵoj.—Reasonable fidelity to the original is expected. A suitable rendering would be "krom vortoj kiuj signifis preskaŭ nenio."

Ĉiu virsekxa, etc.—Probably this would not be understood by one who had not read the original. Substitute "kun la tuta stulteco de viroj kiam ili silente rememoras."

Prezentanta.—"Traludanta" is perhaps a better word.

Al si.—This would be better omitted, as the persons present received the benefit of his conduct.

"Pensoj."—"Pensado" is what is meant.

Tian neĵustecon.—"Tiun" should be used, as it is not a kind of injustice, but a definite individual one that is meant; "injustice" meaning "a wrong" is "maljustaĵo."

"Figuron de sensebleco."—A better expression is "portreton de Senkonscio."

"Precizigas, etc."—Perhaps "alprezigtas kaj ordigtas" would be clearer.

Botelon, etc.—The meaning of the English is better brought out by "malplanan botelon ŝtopita tiel firme kiel plenan." "Stopita" is predicative, and "plena" is not.

Egale tiom da, etc.—The phrase could be shortened with advantage, "kun egale akra sprito, nova elpenso kaj profunda penetremo."

Konsterninte.—"Skandaliginte" is the right word (see Millidge).

(B.C.B.)

RECENZOJ.

LUMO SUR LA VOJON KAJ KARMO. Verkita de Mabel Collins, tradukita de O. Collyn. 31 pĝ. Eldonis Teozofia Esperanta Ligo, Praha, Krakovska 17. 1922. Prezo: 5 kc.

Reguloj por la gvidado de Teozofoj. La originalaj reguloj estas verkitaj en arkaika formo de la sanskrita kaj poste tradukitaj en la grekan lingvon. Lernanto de la tradukinto transdonis ilin al Mabel Collins kaj la esperanta eldono estas traduko el ŝia angla verko. La mallonga artikolo pri "Karmo" enhavas konsilojn por novaj disĉiploj. (C.W.B.)

UNUA LEGOLIBRETO (Rakontoj, fabeloj, kaj popol-legendoj). **DUA LEGOLIBRETO**, (El literaturo, arto kaj scienco). Kolektita de K. Bruggemann. Eldonoj n-roj. 1 kaj 2 de la Universala Biblioteko Friedrich Ader, Dresdena.

Ĉi tiuj libretoj estas malkaraj, la formato estas oportuna por la poŝo kaj la enhavo estas interesa kvankam ne tre nova por ni angle parolantoj; sed tio ne devas surprizi nin, ĉar la angla lingvo estas tre riĉa je tradukoj. Ĉu konatajn ĉu nekonatajn ĉiu ŝatos legi ĉi tiujn eltiraĵojn el deko da mond-famaj libroj, (C.W.B.)

En "La Suda Kruco," (oktobra numero, pĝ. 31), estas dirite, ke la firmao Ferdinand Hirt & Sohn, Salomonstr. 15, Leipzig, grandamase eldonos esperantaĵojn. Kun ĝojo ni vidas la aperon de kelkaj libroj. La A.E.A. havas provizon; legu la anoncon sur la tria paĝo de nia kovrilo. La plej granda el la libroj estas—

STRANGA HEREDAĴO, originala romano verkita de H. A. Lukyten

F.B.E.A., aŭtoro de "Paŭlo Debenham" kaj "Mirinda Amo." Ĉi tiu romano havas amplekson da 320 paĝoj kaj estas havebla ĉe Aŭstralazia Esperanto-Asocio, po 2s. 2d. broŝurite aŭ 3s. 0d. bindite.

Pri la temo mi diros nenion, ĉar la intereso de la legonto ne devas esti malfortigita per priskriboj de la faradoj de la personaro. Sed pro la lingva stilo mi povas senhezite rekomendi la libron al ĉiu, kiu amas legi fluan, bonstilan verkon. En siaj antaŭaj verkoj la aŭtoro montris ke li havas rimarkindan esprimovon kaj en la nuna li denove montras ke lia lerteco kiel rakontanto kaj ankaŭ kiel elpensanto de trafaj esprimoj ne forlasis lin. (C.W.B.)

INTERNACIA KANTARO. Kolekto de 64 popolaj kantoj el 26 nacioj kun aldono de 3 famaj koncertarioj: Händel, G. F. Recitativo kaj ario "Delikataj vi folioj" el la opero "Xerxes". Mozart, W. A., Ario "Dolĉa amo, plena de ĝemoj" el la opero "La edziĝo de Figaro". Wagner, R., Ario "Funebre kovras la krepusko valon", el la opera "Tannhäuser".

Muzika eldono aranĝita de Josef Aĉtĉelik, iama orkestrestro de la opero en Leipzig.

La muzika eldono enhavas 67 pecojn de muziko, bele presitajn sur bona papero en tre oportuna formato. La esperantaj vortoj de la unua strofo estas presitaj sub la muzika notaro kaj la ceterajn strofojn oni trovas en aparta libreto.

La arioj estas rikoltitaj el ĉiuj landoj kaj se oni plene uzos ĉi tiun trezoron de melodio la taŭgeco de Esperanto kiel kantolingvo estos metata antaŭ la publiko kun pli da facileco ol ĝis nun estis eble. (C.W.B.)

STAMATOV, G. P.: NUNTEMPAJ RAKONTOJ el la bulgara originalo trad. Ivan H. Krestanoff. 80 paĝoj. **Enhavo:** 1. Vilao apud la maro. 2. En la tombejo. 3. La estinteco. 4. Pri unu anguleto de l'animo. 5. Du talentoj.

Ĉi tiuj kvin noveloj de nuntempa bulgara verkisto, Stamatov, malkovras al la mondo ekstere de Bulgarujo malfongajn rakontojn iom similajn al tiuj de Edgar Allan Poe, sed nehavantajn lian malsanecan stilon. La tradukinto, Krestanoff, estas en la unua rango de Esperantaj stilistoj kaj de ĉiu vidpunkto la libreto estas tre alloga. (C.W.B.)

HERE AND THERE.

The Brazilian Parliament has voted a subsidy of 1500 milreis (about £50) to the Brazila Esperantista Ligo. About the time when this vote was passed Senor de Rio Branco, the Brazilian delegate at the League of Nations, was showing some hostility to Esperanto. It would seem that the delegate in question is not in touch with the public opinion of his homeland, where a knowledge of Esperanto by postal and telegraph officials is recommended by the responsible minister, where the Parliament makes a money vote for the purpose of aiding in the spread of Esperanto, and where an Esperanto course is being conducted at the Police Headquarters to prepare policemen to help foreign visitors at the national Centenary Exposition.

China is showing notable activity; a Sunday course for beginners at the French concession in Shanghai with 44 students is reported. The Chinese public school at Wusung has a Sunday course with 40 pupils. At Pekin University—a free student body after the style of mediaeval universities, we believe—samideano Eroshenko, the blind Bahaj enthusiast, is helping in an Esperanto course with 251 students. In Kwangtung all schools are reported to have put Esperanto into the curriculum.

"Verda Ombro" of Formosa is translating Hamlet into Japanese from the Esperanto version in parallel column.

The Eighth Italian Congress was held in Trieste during September. About 150 delegates attended and represented 1700 to 1800 members of the Italian Federation.

Mr. Okumija, Mayor of Jokosuka (Japan) is very favourably inclined towards Esperanto. He has lately circularised the schools in that town advocating the teaching of Esperanto as an optional subject. He is the first Mayor in Japan who not only approves of Esperanto but makes practical use of it.

Doctor ŝimonek, of Chicago, was a member of the notable Rumanian Esperanto Congress at Cluj, which turned out to be a veritable international congress, owing to the presence of many samideanoj from Hungary, Germany, Russia and Bulgaria. The congress was a great success not only as a demonstration of Esperanto, but as an

aid to greater friendliness between the Balkan peoples. All the magazines of the land took notice, some with special reports and articles in Esperanto. The queen, and the ministers of arts and science, and of public instruction, sent greetings.

The Geneva Manifesto to teachers has now been translated and published in eight or more languages. The translations make an interesting collection.

The Bolivian Esperanto Association was founded on the 10th of June at Oruro, Bolivia.

FESTO DE LA MELBURNA KLUBO

La Melburna Esperanta Klubo solenis la daton de naskiĝo de Doktoro Zamenhof per koncerto kaj teatraĵo en la Austral Salon, sabaton, 9an de decembro. Malgraŭ la varmega vetero ĉirkaŭ 200 interesatoj ĉeestis kaj ŝajne plene aprobis la programon. Orkestro ludis uverturon, samidearoj kaj samideaninoj kantis, sed la ĉefa afero estis la ludo de la drametoj "Lady Fanny" kaj "La Kara Formortinto." La lasta ne sukcesis tiel bone kiel la unua, eble pro nesufiĉa preparado; tial la servoj de la sufloranto estis ofte necesaj. Dum la vespero oni faris monkollekton por helpi la starigon en Varsovio de monumento super la tombo de Doktoro Zamenhof.

Se vi estas sprita oni vin malamos. Se vi estas malsprita, oni ridigos pri vi. Verŝajne la plej bona afero estas ke ni neniel atentu kion oni diras por aŭ kontraŭ.

POSTISTOJ HAVIS KUNVENON.

La poŝtistoj havis specialan kunvenon en Helsinki sub la prez. de S-ro Spielmann. La asocio havas nun 3,000 membrojn, inter kiuj: 277 en Ĉeĥo-Slovakujo, 75 en Holando, 250 en Ameriko, 150 en Francujo, 23 en Estonujo. Novaj naciaj vicprez.: S-roj di Rienzi (Paris), Lisac (Rogatica), A. Couto Fernandez (Rio de Janeiro), Hubert (Karlovy Var), Modenov (Moskvo). La prez., S-ro Reber, ellaboras fakan vortaron.

GAZETOJ RICEVITAJ.

AMERIKA ESPERANTISTO, sep.; BRAZILA ESPERANTISTO, maj-jun.; ESPERANTO TRIUMFANTA, n-roj. 99-106 FRANCE ESPERANTO, aŭg.-sep., okt.; LA NOVA EPOKO, 1 Tverskaja-Jamskaja 35, kv. 5, Moskvo. Jun.—aug. Nova monata revuo, redaktata de komitato inter kiuj troviĝas lingvaj komitatoj. La enhavo devus gajni por la nova revuo grandan legantaron. LA UNUIGITA TUTHOMARO, jul.—aŭg.; La Revuo Orienta, apr., maj, jun. jul. sep.; La Verda OMBRA, jul., aŭg., sep.; LITOVA STELO, aŭg.; L'ESPERANTO, sep.; LE MONDE ESPERANTISTE, jul.—aŭg.; NOVA EUROPO, aŭg.; SVENSKA ARBETAR-ESPERANTISTEN, n-ro. 2. Arguso, aŭg.; Esperanto-Praktiko, sep.; Pola Esperantisto, 19 Krolewska str., Warsaw, Eliras monate. Plejparte esperante, sed kroniko nacilingve okt.; Verda Utopio, jul.-sep.; Literaturo, apr.-jun., jul.-sep.

REPAIRS ATTENDED TO.

Telephone: Brunswick 714

ALFRED KLEIN,

ELECTRICAL CONTRACTOR

ALL KINDS OF INSTALLATIONS. ESTIMATES SUBMITTED.
LIGHT, POWER AND BELLS.

Special Sale of all kinds of Electrical Goods. The right kind of Present for Home and Friends. Irons, Cookers, Torches, &c., &c.

CALL OR WRITE—

660 SYDNEY ROAD, BRUNSWICK, VIC.

Books! Books! Books!

JUST what you have been waiting for. £50 worth of Books on hand at reasonable prices. Make your Christmas Present a Book, and let it be Esperanto Literature. The latest shipment includes:—

La Karavano, 2/-.
La Vendetta, 2/2.
Tra la Mondo, Vol I., 1/3.
Vol. II., 2/-.
Complete, 3/-.
Patterley, 1/3.
La Paraono, 9/6; Comp., 3 Vol.
Batalo de la Vivo, 1/3.
Struvelpetro, 2/3.
German Text Books, 2/-.
German Dictionaries, 2/3.
Pro Kio, 1/9.
Kantistino, 1/3.
Mirinda Amo, 3/9.
Dua Ekzercaro, 9d.
Tri Angloj Alilande, 1/3.

Fundo de la Mizero, 1/6.
Stranga Heredaĵo, 2/2.
La Nigra Galero, 1/3.
Hermano kaj Doroteo, 1/3.
Kvin Noveloj, 2/-.
La mirinda historio de Petro Schlemihl, 1/3.
Nuntempaj Rakontoj, 4/3.
Dictionaries—Fulcher and Long, 7/6
Edinburgh, 2/-.
Milledge, /6.
Rhodes, 3/9.
Esperanto Fountain Pen, 7/6.
Esperanto Pencil Gift, 9/6, nickel,
4/-.
4/-.

ORDER NOW!

Send for Price List to Librarian,

Australian Esperanto Association

BOX 731, P.O. ELIZABETH STREET,
MELBOURNE.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

“THE RAINBOW,” Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

The House of Stead

Early in the year STEAD'S REVIEW will appear in its improved new form with highly finished paper, perfectly printed, and a three-colour cover that will please the eye. We aim at continual improvement for it is to be a production worthy of presenting to Australians. Its price will remain the same.

Announcements.

In the first four months of next year we will produce several New Magazines. Every one will be expertly cared for from the literary standpoint, and we are also determined to produce all our Magazines in high-grade form—good paper, good printing, and fine illustrations.

Fiction Magazine (Monthly).

Elevating and entertaining stories, good pictures and humorous drawings. Anecdotes by British, Australian and American Authors. Probable Price 9d.

Woman's Journal (Monthly).

All for Australian women. Matter will be treated by experts, and Magazine will be a production worth having and well worthy of Australians. It will be beautifully illustrated and will probably sell at 1/-

Mountain and Seaside (Monthly).

For those contemplating a holiday, this Magazine will be guide, philosopher, and friend. Interesting places throughout Victoria will be written up and illustrated, and full information given. Its pages will be strewn with good stories, sketches and humorous drawings.